

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Tonkin donas
panoramon pri
nia gazetaro**



**Togolando
kongresis pri
infanaj rajtoj**



**Malagasa voĉo
pri adekvata
helpo al Afriko**



IEM: Nia lukso en Vieno

Vi trovos

21 **Malferme**

Malnovaj strukturoj en novaj fluoj
Humphrey Tonkin

22 **IEM VIVAS – SE ONI ĜIN UZAS**

Intervjuo kun Herbert Mayer



24 **La diligenta kolegaro**

Mortis EPĈ, vivu EPĈ! — aŭ:
Vivo kaj morto en nia gazetaro
Humphrey Tonkin

26 **Kongresa Komuniko 2**



29 **Forumo**

Progresi ekster la klasika vojo
FIDILALAO FIRAISANA Henriél

30 **Afriko**

"Infano estas la patro de la homo"

Laŭ AGBEHOU Ayaovi kaj Raoul Hounnake

31 **La lasta Zamenhof-tago de la jarmilo**

Tri "esperantistoj de la jaro 2000"

32 **Recenzoj**

Donald Broadribb pri tri francaj romanoj

Petro Braŭn pri Fadenoj de l'amo

Stefan MacGill pri Maigret hezitas

André Cherpillod pri La familio Zamenhof

Jozefo E. Nagy pri Gaston Waringhien 1901-1991



35 **Laste aperis**

Kaj plue...

36 **Loke**

37 **Anoncetoj**

38 **Fake Oficiala Informilo**

39 **Foliume**

40 **Forpasoj**

La kovrilo: Parto de la Nacia Biblioteko en Vieno

Dekstre: Sekaĵo en Petra, Jordanio (F. L. Veuthey)

ESPERANTO

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisko L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 68,32; USD 34; DEM 59; JPY 3900 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas € 3,00.

Anonctarifo (eŭroj): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefona: +31-10-436-1044.
Telefaksa: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
TTT: <http://www.uea.org>
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo: Pasquale Zapelli.



MALNOVAJ STRUKTUROJ EN NOVAJ FLUOJ

La Ligo de Virinaj Balotantoj ludas gravan rolon en la usona elektoprocedo jam de multaj jaroj: ĝi konsciigas la publikon pri la graveco de aktiva partopreno en elektoj, aŭspicias debatojn inter kandidatoj, kaj helpas organizi armeon da volontuloj, kiuj funkciigas la balotejojn. Kiam, antaŭ kelkaj semajnoj, la Novjorka filio de tiu ĉi tutnacia organizaĵo anoncis ke ĝi intencas fermi sian oficejon pro manko de financo, la novaĵo kaŭzis ondojn de konsterno inter la publiko. Kiel povus esti ke tiel grava kaj influa asocio trovu sin en financa embaraso?

La Ligo jam de multaj jaroj dependas de tradicia strukturo de membroj, kunvenoj, lokaj kluboj, kaj specialaj programoj. Sed malgraŭ la evidenta graveco de ĝia celaro — kaj malgraŭ la daŭra publika konscio pri tiu graveco — ĝia membronombro faladas, malpli da personoj partoprenas ĝiajn aranĝojn, kaj la meza aĝo de la membroj altiĝas. Ne temas pri tio ke ĝia mesaĝo perdas signifon, sed ke la tradicia maniero prezenti tiun mesaĝon ne funkcias kiel antaŭe. En la hodiaŭa Usono de longaj laborhoroj, telefona kontakto kaj kontakto pere de la Reto, la tradiciaj organizaĵoj, ekzemple Rotario, kies ĉefa agado estas regula kunvenado, perdas sian lokon en la karitata merkato. Sukcesas tiuj, ekzemple Amnestio Internacia, Planned Parenthood (pri nasklimigo) kaj la Klubo

Sierra (pri medi-protektado), kiuj ne postulas ke subtenantoj partoprenu kunsidojn aŭ abonu gazetojn, kaj ne dependigas sin de regula alfluo de membro-kotizoj. Ili gajnas siajn rimedojn ĉefe per unuopaj kampanjoj kun specifaj celoj, turnante sin al la publiko per alvokoj pli similaj al anoncoj pri valorpaperoj ol alvokoj pri malavaro: la publiko investas siajn rimedojn por atingi difinitajn rezultojn — ekzemple liberigi politikan malliberulon aŭ konservi difinitan arbaron. Ĝi investas en organizaĵoj kiuj produktas konkretajn rezultojn.

Nia Universala Esperanto-Asocio povus lerni el tio utilan lecionon. Kun sia Delegita Reto, siaj landaj asocioj, siaj lokaj kluboj, sia gazeto, UEA tro multe similas la Ligon de Virinaj Balotantoj kaj nesufiĉe imitas la novajn metodojn de Amnestio Internacia aŭ de Oxfam (kiu laboras kontraŭ malsato). Por fariĝi pli sentema al la novaj fluoj, ne necesas forigi la malnovajn strukturojn: pluraj el la novspecaj organizaĵoj ne malmuntis siajn membrostrukturojn; sed ili traktas la nocion de membreco multe pli flekseble, kaj ankaŭ ne hezitas aktive svati tiujn kiuj neniel intencas pagi membrokotizon, sed ja estas konvink-eblaj malfermi siajn monujojn por subteni specifajn iniciatojn.

Humphrey Tonkin



Herbert Mayer: "Ĉu la esperantistoj"

IEM vivas – se oni ĝin

Privatigo, registara ŝparado – vortoj ofte aŭdeblaj ankaŭ en Aŭstrio. Kion ili signifas por Internacia Esperanto-Muzeo? – ni demandis la IEM-direktoron, Herbert Mayer.

■ *Internacia E-Muzeo ĝuas la envindan privilegion de ŝtata financado. Ĉu ĉiam estis tiel?*


Nian instituton, kies plena nomo estas Internacia Esperanto-Muzeo, Kolektaĵo por planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko, fondis private en 1927 la aŭstro Hugo Steiner (1878-1969), sed jam du jarojn poste IEM fariĝis parto de Aŭstria Nacia Biblioteko. Tiel, efektive, ekde 1929 la aŭstra ŝtato finansas la bibliotekon kaj la muzeon, salajras la bibliotekistojn, pagas la luon de la ejo ktp.

La deklarita celo estis kaj ankoraŭ nun estas: prezenti Esperanton en la muzeo kaj kolekti en nia biblioteko ĉion kio koncernas ĝin kaj aliajn planlingvojn. Dum la 73 jaroj de sia ekzisto, la biblioteko fariĝis la plej granda plene funkcia planlingva biblioteko.

■ *Sufiĉe pionire en Esperantujo, IEM jam en 1996 eniris la interretan epokon (vidu '96 nov., p. 182).*

Ni kreis en la lastaj jaroj du datumbankojn, t.e. bibliotekajn katalogojn elektronikajn: unu estas PUBLIKO, katalogo de niaj pli ol mil Esperanto-afiŝoj, kaj la dua estas TROVANTO, kiu estos iam registrinta nian tutan havaĵon (krom muzeaj objektoj kaj gazetoj): librojn, broŝurojn, nekomercajn publikaĵojn, manuskriptojn, muzikaĵojn, kasedojn, diskojn, vidbendojn ktp. Ĉi-momente troviĝas en ĝi jam pli ol 14 300 dokumentoj. Plej gravas ke TROVANTO estas alirebla per Interreto, kaj tiel ĝi staras senkoste je dispono de ĉiu esperantisto kaj interlingvisto.

Speciale mencienda estas la facila serĉo-strategio de nia datumbanko: eblas trovi la dokumentojn laŭ aŭtoroj, titoloj, serioj, eldon-jaroj, eldonejoj, libro-numeroj, aperlokoj, temoj... La serĉo-lingvo kompreneble estas Esperanto. TROVANTO estas do utila instrumento por ĉiu esploranto



pri Esperanto kaj interlingvistiko. Kun la progreso de la registrada laboro ĝi alproksimiĝas pli kaj pli al la idealo alstrebata: fariĝi la plena katalogo de Esperanto. La plej granda ĝi estas jam nun.

■ *Kiom longe TROVANTO daŭrigos sian kreskon?*

Nu, ni kalkulas ke post la fino de la retrospektiva laboro – t. e. post la registrado de ĉio kio jam troviĝas en nia kolekto – enestos proksimume 50 000 dokumentoj. Komencis la projekton mia koleginino s-ino Helga Farukuoye antaŭ kvin jaroj. Intertempe ni plene prioritatis ĉi tiun

uzas



Internacia Esperanto-Muzeo situas en la impona Viena kastel-komplekso Hofburg. Fondis ĝin Hugo Steiner (dekstre); ekde 1985 laboras en ĝi la nuna direktoro, Herbert Mayer (maldekstre).



laboron, kaj pro tio ekde unu jaro ankaŭ kolego Christian Cimpa kaj mi dediĉas multe da tempo al TROVANTO. Se la cirkonstancoj permesas daŭrigi en la nuna maniero, post kvin jaroj ĉiuj dokumentoj troviĝos en ĝi.

■ Ni aŭdis onidirojn pri reorganizadoj en la Nacia Biblioteko. Kia estas la situacio de IEM?

Se mi scius, mi eble dormus pli trankvile. Sed mi tuj devas konstati ke la gardado de la IEM-havaĵoj estas plene garantiita, nenio iam ajn perdiĝos. Tamen, kelkaj cirkonstancoj de nia laboro eble ŝanĝiĝos. La afero statas jene: kiel en multaj aliaj landoj, ankaŭ en Aŭstrio la ŝtato retiriĝas el multaj entreprenoj. Iom malprecize oni parolas pri "privatigo". Sed tio estas misgvida esprimo: fakte, la ŝtato ne volas vendi la Nacian Bibliotekon, sed ĝin administri laŭ kriterioj de la merkata ekonomio. Kelkajn servojn oni pilargiĝos, aliajn – la ne tiom bezonatajn – oni reduktos.

■ Ĉu tiuj reduktaj tuŝoj la servojn de la Esperanto-Muzeo?

Ni devas formuli la demandon iom ali-maniere: Ĉu la esperantistoj bezonas la Esperanto-Muzeon kaj ties bibliotekon? La Nacia Biblioteko povas nun precize mezuri la bezonatecon de siaj unuopaj servoj: de du jaroj ĝi postulas por siaj servoj pagon, kompreneble tute ne kosto-kovran (ĝi ne repagas eĉ unu procenton de la mono kiun la ŝtato elspezas por la Nacia Biblioteko), sed indiko-valoran.

■ Kaj kion montras tiu indiko pri la bezono je IEM?

Nu, por tute klare kaj honeste respondi: ĝi ne estas tre kuraĝiga. Kiam la samideanoj ekscias ke niaj servoj kostas, ili tre ofte rezignas mendi kopiojn, komisii serĉ-laborojn en niaj arkivoj ktp. Povas esti ke pro tio estontece ni ne povos labori por Esperanto tute same kiel antaŭe, do ne en la nuna amplekso.

■ En kio povus konsisti la reduktio?

Vidu, pro la sendeficitigo de la ŝtata buĝeto multaj postenoj vakas, ĉar ne estas sufiĉe da mono por ili. Tiel statas ankaŭ la Nacia Biblioteko, en kiu la labora situacio fariĝis sufiĉe streĉa. Nun ni estas tri bibliotekistoj en IEM, kio estas, kompare kun la grandeco de nia instituto kaj rilate al aliaj sekcioj de la Nacia Biblioteko, plene kontentiga situacio. Nia klopodo estu ne perdi sur tiu tereno – klopodo vere mal-facila.

Mi revenas al la datumbanko TROVANTO. Kiel dirite, ĝi estas senkoste alirebla en Interreto. Ĉiu vizito al ĝi estas registrata, kaj la monata statistiko informas nin pri ofteco kaj amplekso de tiuj vizitoj. Ankaŭ ĉe tiu punkto la demando ĉu oni bezonas tian datumbankon, estas decida.

■ Kion vi prognozas ĉi-rilate?

Unu afero estas certa: Ni povos daŭrigi la laboron por TROVANTO nur se la esperantistoj nin subtenas, ofte konsultante ĝin en Interreto. En la lasta tempo oni eniris ĝin averaĝe 1000 fojojn en unu monato. Tio estas sufiĉe bona, sed la afero status pli bone, se temus pri duoblo aŭ eĉ trioblo. Ni do invitu la esperantistojn ofte kaj regule viziti TROVANTO-n!

Pli kaj pli indas fari tion, ĉar ĉiumonate konsiderinde plinombriĝas la registritaj dokumentoj. Estus bedaŭrinde se la esperantistaro maltrafus la eblon posedi plenan katalogon de la Esperanto-publikaĵoj ekde 1887 ĝis la nuntempo.

■ Ĉu esperantistoj povus apogi IEM en aliaj manieroj, ekz. per subtenaj leteroj?

Nepre ne skribu subtenleterojn. Ili tute ne helpus, eble ili efikus eĉ male. Helpos nur unu afero: utiligi la servojn de Internacia Esperanto-Muzeo kaj ties biblioteko. ★

La adreso de TROVANTO: http://www.onb.ac.at/online_s/esperanto/espdb.htm.

Mortis EPĈ, vivu EPĈ! – aŭ: Vivo kaj morto en nia gazetaro

Humphrey Tonkin · Usono

La ĉeso de *El Popola Ĉinio* kiel papera gazeto donas okazon al nia aŭtoro pentri pensigan panoramon pri la situacio de la Esperanta gazetaro – kaj iom ankaŭ de la komunumo kiun ĝi spegulas.

La lastatempa malapero de *El Popola Ĉinio*, post kvindek jaroj da regula aperado, elvokis surprize mildajn reagojn en la Esperanto-gazetaro. Tiu bele presita, kleriga revuo donis bildon de Ĉinio eble foje tro poluritan, eble nesufiĉe kritikan: sed saĝa leganto povis multon lerni pri tiu vasta lando el ĝiaj koloraj kaj informriĉaj paĝoj. La revuo ankaŭ havis tiun meriton ke ĝi estis ekster-eŭropa gazeto en movado kiu restas tro radike ligita al Eŭropo kaj la eŭropa lingva fono. Ĝia modela lingvaĵo, kvankam evidente influita de la lingvoj eŭropaj, montris kiel bona Esperanto aspektas kiam kleraj neeŭropanoj efike ĝin uzas.

Necerteco en Britio

Alia lastatempe malaperinta revuo, pli modesta laŭ aspekto kaj pli esperantista laŭ enhavo, estas *La Brita Esperantisto*, kiu ĉesis aperi pasintjare en sia 96-a jaro. Kvankam la Esperantivivo de Britio bone antaŭeniras sur certaj terenoj (daŭre aperas tiu admirinda revueto *Esperanto en Skotlando*; la britaj instruistoj aperigas sian gazeton, same la britaj kristanoj), la kerna landa movado ŝajne ŝvebas en etoso necerteca. Notinde mankis la brita voĉo en la lasta Universala Kongreso. Vendinte sian domon en la centro de Londono, la Asocio ankoraŭ ne konstruis sian novan, espereble pli bonan, domon en provinco; malmuntinte sian imponan Bibliotekon Butler, ĝi nun forŝlosis ĝin en kestojn por atendi esperatan kreigon de nova, pli oportuna ejo. Kiel esprimilo de tiu brita movado, *La Brita Esperantisto* jam de longe perdadis sian ŝlosilan komunikan rolon, sed estas mirige ke


en tiel klera kaj obstina esperantistaro ne estis trovebla eĉ unu servopreta homo por transpreni de William Auld la redaktorecon de la revuo kaj tiel daŭrigi la literaturan tradicion kiun la revuo starigis. Kaj eĉ se la revuo ne plu tuŝas la vivon de multaj britaj esperantistoj, ĉu ne indus teni ĝin viva dum la nuna transira periodo por eviti perdi tiujn kiujn ĝi ja tuŝas?

Tria gazeto kiu forpasis, forpasis kun sia ĉefa motoro, la bedaŭrata s-ino Jeannine Vincent. *Kulturaj Kajeraj* estis la voĉo de Kastelo Grésillon, tiu kursejo kaj konferencejo de la franca esperantistaro, kiu mem suferis malhelpojn diversajn pro ŝtata insisto pri riparoj kaj modernigoj de la domo mem – insisto eventuale tute taŭga, tamen kreanta fincan krizon. Iom post iom la subtenantoj de la kastelo sukcesas venki siajn problemojn [vd. p. 36 – Red.], sed la revuo, iom simile kiel *La Brita Esperantisto*, jam de longe ne havis klare difineblan publikon kaj ne ludis sian iaman rolon. Nur transformita ĝi povus daŭrigi, kaj posteulo de la ĉiofaranta s-ino Vincent ne aperis por ĝin transformi.

Ĉu ŝrumpas subteno?

Rigardante ĉion ĉi en izolo, oni facile povus konkludi ke la Esperanto-komunumo tiel ŝrumpis ke ne eblas plu ekonomie subteni tiujn tri longedaŭrajn revuojn. Dum multaj jaroj ili estis parto de la superstrukturo de tiu komunumo, kaj gravaj kontribuantoj al ĝiaj substrukturoj. Du aspektoj de tiuj substrukturoj estas aparte gravaj: la lingvo-kulturo de Esperanto kaj la libro-kulturo. Tiu lingva kulturo fontas el la aktiva uzado de Esperanto flanke de la anoj de ĝia komunumo:

ideale ĝi vastigas la terenojn sur kiuj la lingvo estas uzata kaj uzebla, kaj ĝi ankaŭ kreas sekvindajn normojn por doni al la lingvo bezonatan stabilecon. La gazetaro estas unu el la ĉefaj rimedoj por teni viva tian lingvan kulturon. La lingvo ja vivas kaj ekspansias nur per utiligado, kaj ĝi restas stabila ĉefe per utiligo flanke de la plej bonaj stilistoj, la plej elturnigemaj fosantoj en ĝiaj nuancoj. Tia estis la stilo de *El Popola Ĉinio*: ĉiu atenta leganto forportis el ĉiu numero kelkajn novajn



modelojn, kaj trovis en la revuo stilajn konfirmojn. La brita gazeto, sub redakto de William Auld, simile rolis kiel instruilo pri bona lingvo-uzo.

La Brita Esperantisto kaj – almenaŭ en la malnovaj tempoj – *Kulturaj Kajeraj* ĉiam enhavis siajn recenzojn. Eksciantie tie pri la haveblo de difinita libro, la legantoj povis relative facile ĝin aĉeti. Ekzistis dialogo pri legado, dialogo ankaŭ pri la aŭtoroj malantaŭ la libroj. Nu, estas vere ke la literaturan historion de Esperanto karakterizas certa preciozo: kiom ofte oni devis legi en la 1920-aj kaj 30-aj jaroj pri superhomoj nomataj Kalocsay aŭ Baghy; kiom ofte oni devis kultivi en si varman senton pri partopreno en rafinita literatura vivo, kiom ofte rideti pri ankoraŭ pliaj karikaturoj de plej ŝatataj aŭtoroj! Tiun tradicion, denove kun certa preciozo kaj troigo, daŭrigas la admirinda *Literatura Foiro*. Sed, malgraŭ la elemento de artefariteco,

la sento ke niaj aŭtoroj estas tie apud ni, ke ili formas parton de nia vivo, kaj ke la gazetaro liveras informojn pri ili kaj subtile gvidas nian legadon — ĉio ĉi estas esenca por funkcia libro-kulturo, al kiu, jam de 30 jaroj, *Literatura Foiro* signife kontribuis per siaj artikoloj kaj recenzoj. Se oni perdas spacon por recenzoj, aŭ se la recenzistoj fuŝas (kiel siatempe admonis Bernard Golden kaj Karolo Piĉ), la libro-kulturo perdas sian sukcon, sian sangon. Precipe la malapero de

Epoko de propraj rimedoj

Sed tiuj iom negativaj konstatoj pri izolitaj fenomenoj en la Esperanto-pejzaĝo ne blindigu nin al la ĝenerala perspektivo. La situacio estas multe pli sana ol tiuj ekzemploj sugestas (kaj vi ja legas tiujn ĉi rimarkojn en unu el la bonaj ekzemploj de kontinueco, la revuo *Esperanto*, kiun mi intence ne traktas en tiu ĉi artikolo). Malgraŭ la fakto ke *El Popola Ĉinio* ja estis vera atuto inter la gazetaro, interalie ĉar ĝi plejparte utiligis la lingvon por atingi alian celon, tamen ĝi estis iasence postlasaĵo de antaŭa tempo. Plejparte pasis la tempo kiam la registaroj apogas per imponaj sumoj malgrandajn revuojn, kiuj bunte ilustras la atingojn de siaj ŝtatoj, aŭ trude insistas pri difinita politika linio: la monda komunika reto kaj la juĝkapablo de la homoj fariĝis multe tro subtilaj por toleri tion. Esperanto, kiel ĉiu alia iniciato en nia merkato difinita mondo, devas vivi per propraj rimedoj. Ni do ĝuadis dum jaroj eldonaĵon markitan por estingo en la senkompata nova mondo.

Se temas pri *Brita Esperantisto*, la brita landa asocio decidis ke anstataŭ la malaperinta propra gazeto, membroj de la asocio ricevu la rusan revuon *La Ondo de Esperanto*. Tiu kontrakto kun alilanda revuo evidente portas multajn avantaĝojn al la rusoj, kies gazeto daŭre riĉiĝas je enhavo kaj espereble ankaŭ konstruas al si firman financon bazon. La reguleco de ĝia apero kaj la kvalito de ĝia enhavo bele kompensas la mankon de la brita voĉo — kaj definitive dementas la supozon ke la morto de unuopaj gazetoj neeviteble heroldas morton de tuta gazetaro. Eĉ supraĵa rigardo al la ĝenerala stato de la Esperanta gazetaro montras, almenaŭ, stabilecon. Fakte temas pri speco de baskulo: gazetoj jen falas, jen leviĝas.

Kreskoj kaj freŝigoj

Ene de malgranda tempopaso, *La Ondo de Esperanto* ekokupis signifan lokon inter la ĉefaj Esperanto-revuoj, sed ĝi ne estas la sola kiu kreskas kaj fortiĝas. Kiam antaŭ kelkaj jaroj *Heroldo de Esperanto* transiris al nova redakcio, multaj homoj bedaŭris la ŝanĝon kaj kritikis la novan redaktan linion, sed, kiel ajn oni rigardu la

situacion el jura vidpunkto, la formulo de la nova *Heroldo* montriĝis sukcesa. Lastatempe ĝi anoncis sian intencon aperi pli ofte kaj pli regule — plia ekzemplo de emo al kresko kaj plifortiĝo en la E-gazetaro. Temas, do, pri transiro kaj transformiĝo — tiuj paŝoj kiuj ne okazis, aŭ ne povis okazi, ĉe *La Brita Esperantisto* kaj *Kulturaj Kajeroj*. Krome, la fakto ke la nova *Heroldo* ne atentis tiel insiste la surlokagadon por Esperanto, lasis lokon por alia relative nova venanto, kiu rapide faris al si signifan reputacion, nome *Eventoj*, simpla, rapide kunmetebla informilo, kiu donas bonan superrigardon de la Esperanto-komunumo.


Eventoj kaj *La Ondo de Esperanto* estas produktoj de la iama socialista bloko, hejmo de plia nova-malnova revuo, *Litova Stelo*, kiu, same kiel *La Ondo*, travivis siajn aperojn kaj malaperojn sub antaŭaj reĝimoj, sed nun establis regulan ritmon kaj kombinas bonajn kulturajn artikolojn kun tekstoj pri enlandaj politikaj evoluoj, kun alta lingva nivelo kaj alloga prezento.

Du fakaj revuoj ankaŭ meritantaj mencion estas *Espero Katolika*, kiu en la lastaj jaroj liveras altnivelan produkton al siaj legantoj, kaj *Dia Regno*, kiu, post multaj jaroj de certa redakta monotono, nun ŝanĝis sian formaton kaj refreŝigis sian enhavon.

La ŝlosilo al sukcesoj

Tiaj sukcesoj ja klare montras ke la Esperanto-gazetaro restas aktiva kaj floranta. Aperigi gazeton, monaton post monato kaj jaron post jaro, ne estas facila tasko, eĉ en la moderna epoko de komputila kompostado kaj facila enpaĝigo. Ĝi postulas disciplinon, inventemon, toleremon pri rutinaj taskoj, kaj la kapablon varbi efikajn kunlaborantojn. La sukcesa historio plenumita de *Literatura Foiro* kaj la aliaj ŝlosilaj kulturaj revuoj *La Gazeto* (15 jaroj) kaj *Fonto* (20 jaroj) meritas nian dankan admiron (kaj kvietan larmon ni verŝu pro malapero de la japana *Riveroj*). Eĉ pli rimarkinda estas *Monato*, kiu atingas nun sian 22-an jaron, liverante al la legantoj superrigardon de la mondo kiun ili trovas nenie en la cetera Esperanto-

p. 28



La Brita Esperantisto estas en tiu rilato neta perdo. Ja ne sufiĉas unu revuo, unu vidpunkto: oni bezonas plurajn, precipe en diaspora, tutmonda lingvokomunumo, kiu ne ĝuas la avantaĝojn de loke alirebla kultura vivo, librovendejoj k.s.

Indas, efektive, ke ni priatentu en ĉiuj aspektoj la lingvan kulturon de Esperanto kaj la libro-kulturon de nia movado. La dua, kompreneble, estas rekta apogilo de la unua kaj samtempe dependas de ĝi: manke de flua uzantoj de la lingvo, malaperos legantoj de la libroj.



86^a Universala Kongreso de Esperanto

Zagreb, 21-28 julio 2001

Adresoj

Konstanta: CO de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎+31/10/436-10-44; 📠436-17-51; ✉uea@inter.nl.net.

LKK: p/a Kroata E-Ligo, Kneza Mislava 11/III, HR-10000 Zagreb, Kroatio; ☎+385/1/461-75-50; 📠461-93-73; ✉esperanto@zg.tel.hr.

TTT

En la paĝaro de UEA (<http://www.uea.org>) troveblas ligo al la UK-paĝo <http://pubwww.srce.hr/esperantokel/ukzagreb.htm>, kaj baldaŭ legeblas tie la Dua Bulteno.

Dua Bulteno

Kun detala oferto de loĝejoj kaj ekskursoj, ĝi aperis komence de februaro kaj estas distribuata al ĉiuj aliĝintaj kongresanoj kaj kongresaj perantoj. Ekde nun eblas mendi loĝadon kaj ekskursojn, kion oni faru kiel eble plej baldaŭ, por certigi la plej favorajn

lokojn en la dezirataj kategorioj.

Loĝado

La loĝiga servo de LKK havas tre favor-prezajn ofertojn por individuoj kaj grupoj en studentaj kaj lernejanaj domoj. Mendilo venos kun la Dua Bulteno al ĉiuj kongresanoj.

Flug-rabato

Croatia Airlines, la oficiala flugkompanio de la UK, donos al kongresanoj apartan rabaton por ĉiuj siaj internaciaj flugoj. Detaloj en la Dua Bulteno.

Vizoj

Bezonantoj de vizo kontaktigu rekte kun la LKK (adreso supre), nepre antaŭ la 1-a de majo.

Infana Kongreseto

Aliĝis al la 34-a Internacia Infana Kongreseto 30 infanoj el 9 landoj. Ili ĝuos komunan semajnon kvazaŭ en kamparo, tamen en atingoj de urbaj trafikiloj.

Ekskursoj gvidos al teknika muzeo, planetario kaj mezepoka kastelo. La kongresejo havas teatreton. Infanojn kun malpli forta parol-kapablo kuraĝigos ludaj studrondoj. Se vi interesiĝas partoprenigi vian infanon (de 6 ĝis 13 jaroj), petu informilon kaj aliĝilon de la CO aŭ de Stefan MacGill (Bethlen G. u. 2, HU-2030 Érd, Hungario; ✉stefan.macgill@galamb.net). Kotizoj: 149 € ĝis 31 marto, 169 € ĝis 15 majo.

Junulara programo

La junulara fako de LKK preparas eventoriĉan semajnon kun malmultekosta loĝado. Informoj kaj aliĝoj ĉe Irina Baraĉ (Ozaljska 112, HR-10000 Zagreb; ✉i.baraĉ@inet.hr).

Honora Komitato

Konsentis eniri ĝin pluraj eminentuloj, i.a. lastatempe Pave Župan-Rusković, ministrino pri turismo (iam lerninta mem E-on), Biserka Cvjetičanin, vic-ministrino pri kulturo, kaj parlamentano Dražen Budiša. La 27-an de nov. Župan-Rusković akceptis LKK-delegacion por informi pri la preparoj. La 8-an de jan. LKK-anoj traktis kun vic-prezidantino de la parlamento, Željka Antunović, kaj en la klerig-ministerio.

Publika atento

En gazetara konferenco (15 jan.) LKK-anoj Spomenka Štimec kaj Judita Rey-Hudeček, kun KKS Nikola Rašić, informis ĵurnalistojn de ok radiostacioj, novaĵagentejoj kaj gazetoj. La 21-an de jan. la kroata novaĵagentejo HINA dissendis depeŝon pri la UK. Lige kun la Eŭropa Jaro de Lingvoj, Judita Rey-Hudeček kaj Ankica Jagnjić gastis en televida kaj radia elsendoj.

Aliĝoj

Ĝis 1 feb. aliĝis 1053 homoj el 50 landoj. Krom la kroatoj plej amase aliĝis francoj, germanoj, japanoj, italoj, poloj, nederlandanoj, hungaroj, belgoj, britoj, brazilanoj, svedoj kaj usonanoj. Atendeblas do UK kun ĉ. 2500 partoprenantoj.

Kotizoj

Ĝis 31 marto validas (sumoj en €; inter krampoj por landoj el grupo B/ C; C = eksa Jugoslavio): Individua membro de UEA (IM) 150 (112/90); ne-IM 187 (140/110). IM junulo/kunulo/handikapito 75 (56/50); ne-IM junulo/kunulo/handikapito 112 (84/70).

ORATORA KONKURSO RELANĈOTA

De 1949 ĝis 1974 konstanta programero en ĉiu UK estis la oratora konkurso por la junularo, aranĝata laŭ regularo redaktita de prof. Ivo Lapenna. Ekde 1960 la gajninto de la unua premio ricevis pokalon donacitan de prof. Lapenna.

La prezidanto de UEA, Kep Enderby, lanĉis la ideon restarigi la konkurson, kaj la Estraro decidis reokazigi ĝin en Zagrebo: unuafoje kiel provon, laŭ la malnova regularo (krom ke la supera aĝlimo por konkursantoj estos 30 jaroj, la nuna aĝlimo de TEJO). La tri monpremioj egalos al tiuj de la Belartaj Konkursoj. Pri aliaj detaloj la Estraro decidis en sia aprila kunsido.

KSM: 378 PETOJ EN 2000

En 2000 Koresponda Servo Mondskala de UEA ricevis 378 korespondpetojn el 53 landoj, je 50 malpli ol en 1999. La nombro de petoj ja tre varias de jaro al jaro. La plej grandaj klientoj de KSM estis Francio (80 petoj), Ruslando (76 petoj: plua kresko post 38 en 1998 kaj 56 en 1999) kaj Brazilo (54 petoj). La aliaj landoj sekvas kun po 10 petoj aŭ malpli.

De 1990 KSM estas prizorgata de François-Xavier Gilbert (B. P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio). Informiĝu / aliĝu kontraŭ unu respondkupono, petu adresojn de korespondemuloj kontraŭ du rk. (sendante detalajn indikojn pri vi kaj pri la dezirataj korespondantoj).

KSM rete: ksmesperanto@aol.com; kaj en 6-lingva TTT-paĝaro: <http://www.multimania.com/kosomol/>.

KOMISIONO POR MEZA EŬROPO

Kiel proponite en konsultigo de mez-eŭropaj landaj asocioj (vidu okt. '00, p. 179), la Estraro de UEA nomumis komisionon por tiu regiono. Membroj en ĝi Oszkár Princz, sekretario de Hungaria E-Asocio (kunordiganto), Ján Vajs, prezidanto de Slovakia E-Federacio, kaj Stanisław Mandrak, prezidanto de Pola E-Asocio.

KOTIZTABELO DE UEA POR 2001

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/eŭro	4	10	24	14	9	48
Aŭstralio/dolaro	14	34	85	51	31	170
Aŭstrio/eŭro	7,63	19,26	47,96	30,52	18,17	95,93
Aŭstrio/ŝilingo	105	265	660	420	250	1320
Belgio/eŭro	7,68	19,21	48,09	30,61	18,34	96,18
Belgio/franko	310	775	1940	1235	740	3880
Brazilo/eŭro	4	10	24	14	9	48
Britio/pundo	5	14	34	21	13	68
Bulgario/eŭro	4	10	24	14	9	48
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	630	380	2100
Danio/krono	55	140	355	230	135	710
Finnlando/eŭro	7,57	19,34	47,93	30,27	18,50	95,87
Finnlando/marko	45	115	285	180	110	570
Francio/eŭro	7,62	19,06	48,02	30,49	18,29	96,04
Francio/franko	50	125	315	200	120	630
Germanio/eŭro	7,67	19,43	48,06	30,17	18,41	96,12
Germanio/marko	15	38	94	59	36	188
Greklando/drakmo	2200	5400	13500	8600	5200	27000
Hispanio/eŭro	7,21	18,03	44,47	28,25	16,83	88,94
Hispanio/peseto	1200	3000	7400	4700	2800	14800
Hungario/forinto	1200	3100	7700	4600	2800	15400
Irlando/eŭro	7,62	19,05	47,93	30,47	17,78	95,86
Irlando/pundo	6	15	37,75	24	14	75,50
Islando/eŭro	8	19	48	29	17	96
Israelo/eŭro	6	16	39	23	14	78
Italio/eŭro	7,75	19,11	48,03	30,47	18,59	96,06
Italio/liro	15000	37000	93000	59000	36000	186000
Japanio/eno	900	2200	5500	3300	2000	11000
Kanado/dolaro	12	30	75	45	27	150
Nederlando/eŭro	8	19	48	31	18	96
Nederlando/guldeno	17,63	41,87	105,78	68,32	39,67	211,56
Norvegio/krono	65	165	415	250	150	830
Nov-Zelando/dolaro	16	40	100	60	36	200
Pollando/eŭro	4	10	24	14	9	48
Portugalia/eŭro	6,98	16,96	42,40	26,94	15,96	84,80
Portugalia/eskudo	1400	3400	8500	5400	3200	17000
Rusio/eŭro	4	10	24	14	9	48
Slovakio/krono	190	480	1200	720	430	2400
Svedio/krono	70	170	430	275	165	860
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Usono/dolaro	8	20	50	30	18	100
TARIFO A/eŭro	5	13	32	19	11	64
TARIFO B/eŭro	4	10	24	14	9	48

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio, San-Marino laŭ Italio, Liĥtenŝtejno laŭ Svislando.

TARIFO A: Honkongo, Korea Resp., Malto, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

☞ (daŭrigo de p. 25)

gazetaro. Temas ĉe *Monato* pri enorma kvanto da materialo, kiun oni devas verki, redakti kaj enpaĝigi.

La sukcesaj gazetoj havas certajn komunajn karakterizojn. Unuavice, ili kreis por si bazon de legantoj ligitaj al la koncerna revuo. *La Ondo de Esperanto* kaj *Monato*, ekzemple, arigis grandan reton de kunlaborantoj, kiuj samtempe liveras la bezonatan materialon por ŝtopi la paĝojn (supozeble en komputila, do facile manipulebla, formo) kaj konsistigas bazon de legantoj. *Heroldo* kaj *Literatura Foiro* sukcese mobilizis grupon da homoj ĉirkaŭ komunaj kredoj pri la dezirata karaktero de la Esperanto-socio, do fidelan legantaron. *Eventoj* plenumas la bezonojn de aktivaj esperantistoj dezirantaj partopreni E-arangojn kaj alimaniere ligi sin al la movado.

La elmigro de diskutoj

Eventoj kaj *Heroldo* ankaŭ efike altigas sian profilon per utiligo de Interreto. La alveno de elektronika komunikado evidente profunde efikis sur la komunikan konduton de la meza esperantisto. Plejparte malaperis, ekzemple, aktivaj diskutopaĝoj el niaj revuoj. Oni ne plu debatas per presitaj gazetoj detalajn gramatikajn punktojn aŭ la signifon de tiu aŭ alia vorto: por tio rolas Interreto. La simpla kvanto de esperantista komunikado pere de la Reto estas preskaŭ senspiriga. Kvankam ĝia alveno eble forŝtelis de la gazetaro unu elementon en ties vivanteco, ekzistas nenia dubo ke la Reto ebligas al la unuopaj homoj pli profundan studon de la lingvaj ecoj de Esperanto, altigas la lingvonivelon, kaj donas al unuopuloj novajn okazojn por ligi sin al tutmonda movado.

Suferis ĉefe tiuj gazetoj kiuj kvazaŭ specialistis pri publika debato, kiel ekzemple la iam konsterne vigla *Senaciulo*, kiu, kvankam regule aperanta, verŝajne bezonas novan, pli freŝan direkton. Per livero de novaĵoj elektronike, *Eventoj* kaj *Heroldo* ŝajne ne igas la homojn malaboni la presitajn gazetojn, sed, male, stimulas ilin al regula legado kaj ankaŭ persvasas ilin kontribui mem per novaĵoj kaj reagoj. Gazeto kiu perdas kontakton kun sia publiko, aŭ ne sukcesas entute

difini kaj trovi tiun publikon, ne povas bone sukcesi.

Monato vastigas la terenon

Monato estas aparte interesa kazo, ĉar ĝi aliris la publikon laŭ iom alia maniero. Dum plejparte la redaktoroj de niaj gazetoj supozas ke ilia celo estas liveri al la legantoj spertojn kiuj rekte priservas iliajn interesojn kiel esperantistoj, *Monato* celas invadi la legospacon normale okupatan de nacilingvaj revuoj — do ekspansiigi la terenon kie Esperanto rolas. La ĉefa danĝero pri tia strategio estas ke la lojaleco de la legantaro eventuale restos malforta: ili estos forlogeblaj de kiu ajn konkurenca nacilingvaĵo. Tamen, se ni volas ke la E-komunumo vastiĝu, kaj ke Esperanto fariĝu io pli ol flankokupo, tiu strategio estas aparte grava. *Monato* plifirmigas la rilatojn kun la legantaro per absolute regula aperado, kaj ĝi ekspluatas la kunligon per rete alirebla libroservo.

Pluraj Esperanto-gazetoj jam havas sian publikon: la membraron de la unuopaj landaj asocioj. Ekzistas pluraj tiaj gazetoj kun nacia aŭ regiona bazo, kiuj bone plenumas la taskon komunikiĝi inter landa asocio kaj ties membraro, kaj samtempe altigas la ĝeneralan scion kaj lingvonivelon de la legantoj. Menciindaj estas la hispana *Boletín*, la aŭstralia–novzelanda *Esperanto sub la Suda Kruco*, la itala *L'esperanto*, la germana *Esperanto-aktuell*, la japana *La Revuo Orienta*, la sveda *La Espero*, la finna *Esperantolehti*... Regula kaj fidinda aperado estas nepre, ĉar sen ĝi ne nur perdiĝas leganto, sed eventuale perdiĝas membro de la koncerna landa asocio. Sur tiu tereno kaj aliaj, *Litova*

Stelo konsistigas sekvindan ekzemplon. Pluraj landaj asocioj, ekzemple en Belgio kaj Nederlando, direktas siajn organojn parte al eksteruloj, kreskigante sian publikon per efika aliro al nacilingvaj eksterstarantoj.

EPĈ, ĉu vojmontra?

Sed, post kvindek jaroj, eble estas tro frue deskribi la belan kaj informriĉan revuon *El Popola Ĉinio*. Min tristigas la fakto ke ĝi ne plu aperos ĉiumonate en mia poŝtkesto, kun horloĝa reguleco. Miajn sciojn pri Ĉinio (kiujn mi poste dividis kun la homoj kiujn mi renkontis dum mia labortago kaj en mia profesia vivo, tiel ke unu leganto havis grandan vastigan efikon) mi ne plu povos ĉerpi el ĝiaj paĝoj. Tamen EPĈ ne malaperos, sed transformiĝos: la revuo ekde nun ne aperos en presita formo, sed ja daŭrigos sian ekziston surrete, per la Tuttera Teksaĵo. La Reto havas evidentajn avantaĝojn super presita revuo: ĝi estas ĉiam alirebla, facile distribuebla, kaj kapabla kombini skribitajn kaj parolatajn tekstojn. Kiel jam evidentiĝis ĉe niaj radiostacioj, ekzemple Pola Radio, la nova teknologio malfermas tute novajn, revoluciajn eblojn. Se *El Popola Ĉinio* havos klarvidon, imagopovon pri la nova teknologio, kaj kapablon krei komunumon de legantoj (tamen pli malfacile per la Reto ol per abonantaro), ĝi eble fariĝos ne la Esperanto-revuo kiu mortis, sed la Esperanto-revuo kiu montras vojon al nova fazo en la evoluo de nia gazetaro. Do, ne atendadu la poŝtiston, sed iru tuj al <http://www.chinareport.com.cn/> por renovigi vian kontakton per modela Esperanto kun la plej multnombra popolo de la mondo... ★

KLEKS en sia nigra serio prezentas...

HIGIENO DE L' MURDISTO

de Amélie Nothomb,
en traduko de Armela Le Quint kaj Ĵak Le Puil

Juna ĵurnalistino malkovras sekretojn intervjuante mizantropan Nobel-premiiton literaturan.

Bielsko-Biala: KLEKS, 1999. Bindita. € 9,00.
Triona rabato ekde tri ekz. ĉe UEA.



Progresi ekster la klasika vojo

Por tiuj kiuj bone regas la lingvon, kiel tiri profiton konkretan el Esperanto? — tiel ĉeftemis la Unua Nacia Kongreso sub la aŭspicio de Malagasa E-Unuiĝo last-julie en la malagasa ĉefurbo.

Kundiskutis multaj gejunuloj, kaj la plimulto montris senpaciencon transformi Esperanton en perilon por helpi ilin solvi la vivtenan problemon. Ĉefa plendo estis: post plurjara lernado, al kio ja utilas Esperanto? Tiuj gejunuloj jam sekvis la klasikan vojon (korespondado, legado, verkado, enklubiĝo), sed kion konkrete alportas al ili Esperanto? Aŭ pli bone, kion konkrete ili povas fari pere de ĝi? En Esperantujo, oni evitas respondi tian demandon, kaj tio ne estas la prioritato de UEA-anoj. Neeviteble, el tia sinteno naskiĝas dubo, kiu instigas al forlaso de nia komunumo. Por malagasioj, Esperanto estas neniam hobia, sed okupo plenrajta; tial post du aŭ tri jaroj da seriozeco sen difinita celo, multaj malaperis el la malvasta cirkvito.

Konvinki pri konkretaĵoj

Tiu varma diskuto memorigis min pri mia vojaĝo en 1996 en Nederlando, Germanio kaj Ĉeĥio. Renkontante e-istojn, mi ĉiufoje provadis konvinki ilin fari ion konkretan nome de Esperanto, kiu allogus malagasajn gejunulojn lerni la lingvon. Mi proponis ke ili helpu min, interalie, per kontakton cele al ĝemeligado kun urboj en mia lando; parigi lernejojn; kontakti vojaĝagentejojn intereseblajn pri Malagasio — sed rideto kvazaŭ primoka renkontis miajn (eble naivajn) proponojn. Iu respondeculo pri Afriko eĉ asertis al mi ke mia intenco povus igi Esperanton suspektinda! Mi rezignis.

Amare mi konstatas ke la esperantista komunumo agas

ortodokse kaj inklinas nur al rita ripetado, daŭrigo de iu kutima vivmaniero. Neniu kuraĝas paŝi alimaniere. Kia paradokso, kiam mi konsideras la inercian forton de nia komunumo! Kleruloj,



sciencistoj, teknikistoj, inĝenieroj, mecenatoj, fakuloj, altranguloj, bonvolemluloj, Nobel-premiitoj kaj ankaŭ ordinaruloj... Se Esperanto postvivis la 20-an jarcenton, tion ni ŝuldas al ili ĉiuj.

Interna ideo iĝis tabuo

Sed ho, ve! Aliflanke de tia latentata potenco, samideanoj en la tria mondo ĉiutage baraktas por vivteni sin, ĉiam spite vivigante Esperanton. Bedaŭrinde, nur manplena anaro el la unue menciitaj amas (temas ja pri amo!) helpi ilin nome de Esperanto, ĉar la interna ideo de Zamenhof iĝis tabuo alportanta honton al siaj defendantoj.

De kelkaj jaroj oni kuraĝigas esperantistojn en Afriko memstariĝi — kvazaŭ oni kuraĝigus bubon ekmarŝi malgraŭ manko je vitaminoj. Evidentas ke baldaŭ li falos kaj disrompiĝos la ostoj. Kion ni ja bezonas? Ne homojn por daŭre teni niajn manojn, sed provizon de sufiĉa nutraĵo vitaminoza por ke ni mem kapablu antaŭenmarŝi. Tiel triamondano estos aŭtonoma kaj poste liberiĝos el dependeco, ŝuldo, almozetado.

Se Esperantujo volas helpi nin kaj sekve plifortigi la movadon, necesas ke ni igu Esperanton profesifonto.

Antaŭ tri jaroj, mi artikolis en la malagasa revuo *Inter Ni* pri la neceso transirigi teknologion per Esperanto, ĉar Afriko multe bezonas tion. Sed neniu reagis. Poste samtipan artikolon mi

proponis al ĉi tiu revuo, sed ĝi neniam aperis! Kulpis, eble, la ideo krei fondaĵon (unu plian!) por transirigo de teknologio...

Adekvate por Afriko

Mi ĝojas vidinte ke starigis Afrika Komisiono de UEA. Finfine iu komprenas kiel filozofio estas adekvata por la movado afrika. Denove mi proponas al tiu Komisiono ideon eble naivan — UEA certe rifuzos ĝin. Mi proponas ke bonvolemluloj alportu sian kontribuon al starigota fondaĵo, kiu helpu triamondanon krei etan entreprenon, kiu siavice puŝos la disvolviĝon de E-o en tiu lando. Tiu fondaĵo financu parte aŭ tute projekton en kiu partoprenos E-parolantoj. Tiuj nepre kunlaboru kun la loka E-asocio por ellabori kaj plenumi la projekton. Ĝi estu ligita al Esperanto, servu al ia informado/instruado/disvastigado/allogado kaj, ne malgrave, al vivteno de la koncernataj esperantistoj, kiuj agos kiel konstantaj profesiuloj.

Dum la nacia kongreso multis la ekzemploj. Ĉefurbaj e-istoj intencas starigi rapidmanĝejon kie dungigos 2-4 Esperanto-parolantoj. Alia projekto temas pri starigo de privata lernejo, kie instruos esperantistoj-profesiuloj kaj Esperanto inkludiĝos en la temaro. Aliaj intencas doktoriĝi pri esperantologio por plialtigi la prestiĝon de la komunumo nialande.

Ne bremsu neŭtraleco

Ĉe ni aktivis multe da neregistaraĵoj organizaĵoj, kiuj iel mildigas la inferan vivetoston de malagasioj. Kial ne provi ion similan, karaj mecenatoj-esperantistoj, kaj samtempe progresigi la movadon de nia insulo? Tio certe kontraŭdiras la vidpunkton de UEA-profesiuloj, kies pretenda glava neŭtraleco (krom rajto je lingvoj, ŝajne!) brile minacas revoluciemon. Ili ja refrenas ke UEA ne similas al NRO-j karitataj. Parte prave, sed ne forgesu ke dum la mondmilitoj UEA aktive helpis viktimojn, eĉ neesperantistojn! Nome de la kerna filozofio de Esperanto, *ni postulas* konsideron pri tio ke nin viktimitas la nuna mondsituacio ekonomia. Esperantistoj helpu nin, se UEA ne emas tion fari! Se iam ni atingos la sudkorean ekonomia-nivelon, tiam ankaŭ ni kapablos kun amo kaj abnegacio tiom kontribui al UEA kiom koreoj faras.

Sed malgraŭ la malfaciloj, ni ja strebas lerni Esperanton kaj klopodas progresigi ĝin tra la tuta lando. Helpu nin, bonvolu kompreni nian propran stilon disvastigadi Esperanton kadre de nia kulturo, tradicio kaj sentemo. Kion ni profesie planas? Realan projektaron vivipovan, kiu implicas bonvolemajn esperantistojn pretajn financi ĝin. Ĉi tiuj estas vi — se vi decidis plihumanigi la nunan vizaĝon de la E-movado. Guto post guto faros riveron.

Esperanto kiel ĉefa okupo, Esperanto kiel profesifonto, Esperanto kiel persona prestiĝo: jen estas nia revo en Malagasio. Diskutu, proponu, primoku, kontaktu:

**FIDILALAO FIRAISANA
Henriél, Professeur au
Lycée de Tsaratanána,
MG-421, Tsaratanána,
Madagaskaro**

FIDILALAO FIRAISANA Henriél (1966) estas delegito de UEA, mezlerneja instruisto pri la franca lingvo.



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

estas via asocio.

Kiel membro de UEA vi apartenas
al komunumo de esperantistoj
en 120 landoj.

www.uea.org

KOTIZTABELO DE UEA POR 2001

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estos farita antaŭ la 30-a de septembro 2001.

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	14	34	85	51	31	170
Aŭstrio/ŝilingo	105	265	660	420	250	1320
Belgio/franko	310	775	1940	1235	740	3880
Britio/pundo	5	14	34	21	13	68
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	630	380	2100
Danio/krono	55	140	355	230	135	710
<i>Eŭro-landoj</i>	8	19	48	31	18	96
Finnlando/marko	45	115	285	180	110	570
Francio/franko	50	125	315	200	120	630
Germanio/marko	15	38	94	59	36	188
Greklando/drakmo	2200	5400	13500	8600	5200	27000
Hispanio/peseto	1200	3000	7400	4700	2800	14800
Hungario/forinto	1200	3100	7700	4600	2800	15400
Irlando/pundo	6	15	37,75	24	14	75,50
Islando/eŭro	8	19	48	29	17	96
Israelo/eŭro	6	16	39	23	14	78
Italio/liro	15000	37000	93000	59000	36000	186000
Japanio/eno	900	2200	5500	3300	2000	11000
Kanado/dolaro	12	30	75	45	27	150
Nederlando/guldeno	17,63	41,87	105,78	68,32	39,67	211,56
Norvegio/krono	65	165	415	250	150	830
Nov-Zelando/dolaro	16	40	100	60	36	200
Portugaliao/eskudo	1400	3400	8500	5400	3200	17000
Slovakio/krono	190	480	1200	720	430	2400
Svedio/krono	70	170	430	275	165	860
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Usono/dolaro	8	20	50	30	18	100
TARIFO A/eŭro	5	13	32	19	11	64
TARIFO B/eŭro	4	10	24	14	9	48

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio, Liĥtenŝtejno laŭ Svislando.

TARIFO A: Honkongo, Korea Resp., Malto, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

JES, mi volas membriĝi en UEA!

Mi membriĝas por la jaro 20____ en kategorio: ☐ MG / ☐ MJ / ☐ MJ-T / ☐ MA / ☐ MA-T / ☐ DM.

Mi volas aboni la revuojn: ☐ SA (*Esperanto*) / ☐ Kto (*Kontakto*).

Mi volas aldone subteni UEA/TEJO pagante por: ☐ SZ (Societo Zamenhof) / ☐ PT (Patrono de TEJO).

Mi pagas la sumon de _____ (bv. indiki valuton).

Mi krome pagas la sumon de _____ (bv. indiki valuton) por la persono indikita dorsflanke.

Pagmanieroj:

☐ Mi pagas al la kotizperanto en mia lando (vidu p. 35-38 en Jarlibro 2000).

☐ Bv. debeti mian UEA-konton, kie estas sufiĉa bonhavo.

☐ Mi pagas al poŝta konto de UEA (por pago al konto ekster via lando bv. aldoni 5 eŭrojn / 11 guldenojn).

☐ Bv. debeti mian American Express / Visa / Eurocard / Mastercard / Access / JCB:

|_|_|_|_| |_|_|_|_| |_|_|_|_| |_|_|_|_| valida ĝis: ____ / ____.

NOMO _____ UEA-KODO (se konata) _____

ADRESO _____

_____ NASKIĜJARO _____

DATO _____ SUBSKRIBO _____

Poŝtaj kontoj de UEA: Nederlando 378964; Belgio: 000-1631831-97; Germanio (Köln) 3182 91 509 BLZ 370 100 50;
Svedio 74374-0; Svislando (Bulle) 12-2310-0

Mi (nomo) _____ donacas:

- membrecon por la jaro 20_____ en kategorio:
☐ MG / ☐ MJ / ☐ MJ-T / ☐ MA / ☐ MA-T / ☐ DM
- abonon al la revuoj:
☐ SA (*Esperanto*) / ☐ Kto (*Kontakto*)

al:

NOMO _____ UEA-KODO (se konata) _____

ADRESO _____

_____ NASKIĜJARO _____

Mi ne (re)membriĝas, ĉar: _____

Bv. resendi al Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

"Infano estas la patro de la homo"

Unuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE) ne hezitis elekti por sia Oka Kongreso (27-31 dec., Tsévié) temon kun socia signifo: "Esperanto kaj la infanaj rajtoj".

Sur matoj, tabloj kaj benkoj de liceo tranoktadis pli ol 80 togolandanoj, 2 beninanoj, 12 niĝerianoj, unu ganaano, unu francino kaj unu togolandano el Kotdivuaro, kiuj, malgraŭ la kompatvekaj kondiĉoj, ĝuis la kvartagan kongresan restadon en Tsévié.

Okazis viglaj diskutrondoj pri kvin temoj:


- Kiel gajni monon per Esperanto?
- Kiel vojaĝi per Esperanto?
- Esperantismo / Interna Ideo / Homaranismo;
- Kiel estraraniĝi en la movado togolanda?
- La vivo en la CO de UEA.

La debatoj plian fojon komprenigis ke la simpla lernado de Esperanto ne donos monon al la lernanto; kompenso, lernado kaj uzado de la lingvo donos ideojn pli klarajn pri esperantismo, pri UEA, pri la esperantistoj. La tekstojn de la debat-enkondukoj enhavas la aperonta kongresa libro.

Pri la ĉeftemo, infanaj rajtoj, tuj post la malfermo prelegis AFANTCHAO-BIAKOU Yao. Konsiderante ke la "infano estas la patro de la homo", la kongreso rekomendis per rezolucio starigon de UTE-fako pri la rajtoj de infanoj (kiu kunlaboru kun jam ekzistantaj organizaĵoj samterenaj) kaj publikigon de dokumentoj pri infanrajtoj en Esperanto kaj en afrikaj lingvoj.

La komitato de UTE elektis la estrarojn de UTE kaj de la junulara organizo JOTE. Novaj elektitoj estas, ĉe UTE, vic-prezidanto DOUMEGNON Koffi, sekretario AGBEHOU Ayaovi kaj vic-sekretario ADJE Adjevi; ĉe JOTE,

De maldekstre: K. Gbeglo, Y. Afantchao-Biakou, K. Sagbadjelou



sekretario Willy Kokouvi, vic-sekretario DEGBE Zissou kaj kasisto ATTIOGBE-AGBEMADON Carine-Dédé. Oni decidis ke la 9-a Togolanda E-Kongreso okazu en Notsé, de 27 ĝis 31 dec. 2001.

La estrarano de UEA pri Afrika agado, GBEGLO Koffi, multe parolis kun kongresanoj, kaj aparte kunvenis kun la niĝeria delegacio, en kiu precipis ok membroj de Badagry E-Movado [vidu nov. '00, p. 197]. Gbeglo klarigis pri la subvencio fare de UEA al Afriko kaj pri la klopodoj de afrikanoj por trovi pliajn monfontojn.

En sesio de la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI, sukcesis 2 kandidatoj ĉe la elementa kaj 4 ĉe la meza nivelo — el 11 resp. 9 provincoj. La ekzamenon antaŭis kvartaga prepara kurso en Tsévié, kun partopreno ankaŭ

de tri ganaanoj ne kongresantaj. La togolanda ILEI-sekcio profitis la okazon: la profesiaj instruistoj ATTIOGBE-AGBEMADON Mensah kaj SAGBADJELOU Kokou plispertigis pri kursgvidado la novulojn KOUÉVI Togbe Basile kaj AGBEHOU Ayaovi.

La kultura programo estis riĉa je

kantoj, folkloro, skeĉoj kaj teatraĵoj, kaj preskaŭ ĉiuj kongresanoj partoprenis ne-senpagan kvizon kun respondendaj demandoj, loterio, aŭkcio kaj la ridiga ero "Rikariko". Ĉar UTE agadas ankaŭ sporte, ne povis manki futbalmatĉo, en kiu la teamo "Esperanto" malgajnis je 2:3 kontraŭ la skipo "Maljunaj Pulmoj" de Tsévié.

La kongreso, kiun malfermis la vicurbestro de Tsévié, allogis ĵurnalistojn de tri radiostacioj. Informite de la togolanda novaĵagentejo ATOP, ankaŭ la ĉiutaga ŝtata gazeto, *Togo-Presse*, raportis la 11-an de jan. pri la kongreso, elstarigante ke ĝi "starigis komisionon kies devo estas informi gepatrojn kaj homojn pri protektado de la infanaj rajtoj."

Laŭ raportoj de

AGBEHOU Ayaovi kaj Raoul Hounnake

RET-INFO

Retpoŝta Esperanto-novaĵservo

<http://www.esperanto.hu> ret-info@esperanto.org

UK: Ĝis la 1-a de feb. al la Zagreba UK (21-28 jul.2001) aliĝis 1053 personoj el 50 landoj.

Gvatemalo: Reaktivigo

Post reaktivigo de la ĉefurba grupo, Zamenhof-festo okazis en Chimaltenango, kie aktivas Rubén Ortiz, partopreninto de la seminarioj de Indigenaj Dialogoj.
(P. Chavignon)

LA LASTA

Francio: Pariza komuno

Unuafoje de multaj jardekoj, naŭ E-organizo el la Pariza regiono Ile-de-France komune Zamenhof-festis en Choisy-le-Roi, kun 200 personoj el 8 landoj. André Cherpillod prelegis pri "Lingvoj kaj Eŭropo" al pli ol 120 homoj. Dum arbo-plantado ĉe Zamenhof-busto festparolis i.a. urbestro Daniel Davisse kaj senatanino Hélène Luc. La profito el lotumado iris al la renovigaj laboroj en Grésillon.
(*Espéranto-Ile-de-France*)

Hungario: E-biblioteko en muzeon

En la Budapeŝta festo György Na-novfszky, la prezidanto de Hungaria E-Asocio, anoncis ke la grandioza E-biblioteko de Károly Fajsz ricevos lokon en Muzeo Festetich en Keszthely, urbeto ĉe la lago Balaton.
(B. Vaha)



Ukrainio: Jubileo en Ĥarkovo

Ĉi-decembre la esperantistoj en Ĥarkovo festis ne nur la Zamenhofan naskiĝtagon, sed ankaŭ la 90-an naskiĝdatrevenon de Esperanto-societo en Ĥarkovo, fondita la 12-an de decembro 1910. Nur iom pli ol jaron poste, en januaro 1912, la Ĥarkovaj e-istoj povis bonvenigi en sia urbo Edmond Privat kaj lian edzinon Joséphine, videblajn meze en la foto. (D. Cibulevskij)

ZAMENHOF-TAGO

Germanio: Jida fokuso

Pli ol 50 homojn allogis programo riĉa i.a. je klezmermuziko (Peter Bäß, Diana Grupp), legado de jida rakonto (Peter Kühnel), prelego pri la jida lingvo (Matthias Behlert) kaj aŭkcio de la postlasaĵoj de Karl Maier.
(*Berlina Informilo*)

DE LA JARMILO

TRI "ESPERANTISTOJ DE LA JARO 2000"

La revuo *La Ondo de Esperanto* ekde 1998 proklamas "la esperantiston de la jaro". La unua laŭreato estis William Auld, kiun en 1999 sekvis UEA-prezidanto Kep Enderby. En 2000, la kandidatigantoj (Marija Beloŝeviĉ, Viŝnja Branković, Renato Corsetti, István Ertl, Judit Felszeghy, Edmund Grimley Evans, Aleksander Korjenkov, Bruno Masala, Valentin Melnikov) proponis entute 20 personojn, el kiuj la elektantoj (Petr Chrdle, Lee Chong-Yeong, Geraldo Mattos, Stefan Maul, Mine Yosataka, Sergio Pokrovskij, Anna M. Ritamäki, Roland Rotsaert, Ljubomir Trifončovski) povis voĉdoni por po 1 ĝis 3 nomoj.

En la Zamenhofa Tago estis anoncita la rezulto:

Arkivo de UEA



Jouko Lindstedt



Mauro La Torre



Hans Bakker

3 voĉoj: Hans Bakker, Mauro La Torre, Jouko Lindstedt

2 voĉoj: Renato Corsetti, Ilona Koutny, Floréal Martorell

1 voĉo: Reinhard Fössmeier, Jerzy Fornal, Stano Marček, Tibor Papp, Andrzej Pettyn, Claude Piron, Katalin Smidéliusz


Estis do kunproklamitaj tri "esperantistoj de la jaro 2000":

Hans Bakker (Nederlando) pro la sukcesoj en la agado por E-o en Afriko;

Mauro La Torre (Italio) pro la projekto Interkulturo, kies Kvazaŭlernejo

Tibor Sekelj jam ampleksas preskaŭ 100 klasojn el trideko da landoj; Jouko Lindstedt (Finnlando) pro la prizorgo de la BJA-diskutlisto, okazigo de la seminario "20 jarojn post Raŭmo" kaj pro la redaktado de la furora *Hejma vortaro*.

Laŭ komuniko de Halina Gorecka, sekretario



Recenzoj

Beletro

Ne forgesu ekstereŭropanojn


La verda sanktejo (1981). Hervé Bazin (1911-96). 1998. 260p. 21cm. € 16,80.
La morto neniun forgesas (1989). Didier Daeninckx (1949). 1996. 172p. 21cm.
 € 13,50. **Sezaranoj miaj fratoj!** Michel Prodeau. 1997. 163p. 19cm. € 11,40.
 Ĉiuj: El la franca trad. Christian Rivière. Nantes: la tradukinto.

Tridekjara viro ekaperas, nuda, sur izolita insuleto. Pro akcidento li estas vundita, kaj montriĝas ke neniuj konas lin. Krome, li plene rifuzas informi pri si. La aŭtoritatoj ne akceptas lian anonimecon kaj enkarcerigas lin. Fine, pro sia heroa agado dum katastrofo, li estas liberigita. Tamen oni plu strebas identigi lin, kaj fine oni sukcesas. Sed li, senspirige, forfuĝas por resti vere libera.

La romano *La verda sanktejo* prezentas al ni temon gravan en nia epoko de senĉesa perdado de privateco fronte al komercaj entreprenoj kaj al registaroj; epoko kiam niaj personaj detaloj diskoniĝas kiam ajn ni per TTT konektiĝas kun kiu ajn entrepreno. Kiom ni rajtas kaŝi nin, kiel la ĉefpersono? Kiom ni rajtas al anonimeco en la nuna "informteknologia" epoko? La romano pensigas nin, kaj la tre simpatia bildo pri la anonimulo evidentigas la vidpunkton de la aŭtoro.

La morto neniun forgesas estas vere interesa krimromano, kiu tre sukcese kaŝas sian sekreton ĝis la lastaj paĝoj, kiam subite intrigo kaŝita evidentiĝas. La ĉefrolulo, Jean, aktivis en la franca rezist-movado dum kelkaj semajnoj en 1944. Li estis

Ŝati romanon, mem traduki kaj mem eldoni — jen la recepto de Christian Rivière.



farita dum tiuj semajnoj en 1944. Oni verdiktis lin kulpas, kaj li restas plurajn jarojn en karceroj, tute ne sciante kian krimon li faris. Kio unuavide aspektas simpla romano, fariĝas multe malpli simpla.

La lingvouzo de la traduko ne estas ĉiam klara, kaj multaj aludoj restas sen klarigo. Sed la romano estas lerte verkita kaj leginda. Mi ne scias ĉu ĝi estis furorverko en Francio, sed ĝi meritas tion. [*Jes, ĝi estas daŭre reeldonata ekde sia apero en 1989 - Red.*]

"Sezaranoj" estas loĝantoj de la vilaĝo Sankta-Sezarino. Pri ili kaj pri la misaventuroj kaj ridigaj trompoj de la aminda ĉarlatano Ahmed Tuk temas *Sezaranoj miaj fratoj!*: sprita, satira romano. Iom proksime al la fino, la aŭtoro interrompas sian

romanon per longa prediko kontraŭ maltoleremo. Tamen la leganto povas facile trakuri la koncernan sektion kaj remergi sin en la rakonton.

La stilo de la traduko estas iom peza, pli ol en la du aliaj romanoj. Dupaĝa apendico klarigas plurajn francelingvajn nomojn kaj aludojn; tamen multaj restas misteraj.

Ĉi-loke mi deziras registri mian proponon ke ni imitu la ĉinajn Esperanto-verkistojn, kaj klarigu per piednotoj aludojn kaj kulturajn fenome-

najn kiuj ne estas tutmonde konataj. Ofte eŭropanoj ne konscias ke multaj historiaj eventoj kaj historiaj nomoj — eĉ aktualaj — ne estas same famaj ekster Eŭropo. Kiel aŭstraliano, mi devas multe cerbumi pri sociaj kutimoj menciitaj en eŭropaj romanoj. Ankaŭ la jura sistemo de Francio, ekzemple, estas tre malsimila al tiu de la anglalingvaj landoj. Simile pri manĝaĵoj, vestoj kc. Des pli perplekse por ĉino, tibetano, japano... Multegaj detaloj, eventoj kaj nomoj el la dua mondmilito estas sensignifaj por persono kiu ne traspertis ilin. Nuntempe la plimulto de la esperantistoj estas ekstereŭropanoj. Eldonistoj kaj redaktoroj ne forgesu tion.

(Pli ampleksa recenzo, de la sama recenzanto pri la samaj libroj, aperis, pro eraro de la recenzanto, en *Monato*, 2000/12.)

Donald Broadribb · Aŭstralio

Alain Fournier

La granda Meaulnes

Fama priskribo de pura amo.
 La sola verko de la aŭtoro,
 kiu mortis nur 27-jara.

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo, 1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: € 10,20.

Ekster la tradicia moralo

Fadenoj de l' amo (1989). Gerrit Berveling (1944). Chapecó: Fonto, 1998. 104p. 21cm. € 12,00.

Ke Gerrit Berveling — erudiciulo, klasikisto, redaktoro de nia valoro revuo *Fonto* — decidis kaj sukcesis verki roman(et)on, ne estas strangaĵo. Ni pensu pri Umberto Eco kaj lia *La nomo de la rozo*. Ne nepre divorcaj staras klero kaj lerto, scienco kaj kreivo.

Eco verkis sian romanon en lingvo ne malgranda — la itala. Berveling en lingvo nana — Esperanto. *Fadenoj de l' amo* estas nova ĉenero en nia literaturo. Tamen la romaneto estas stile malpli antaŭenpuŝa kaj energia ol la verkoj de Ŝtimec. Nek stile nek enhave ĝi atingas la saman sojlon kiel la plejparto de la rakontoj en la iberaj *Ekstremoj*. Sed la Bervelinga verko nepre legindas, pro pluraj kialoj, inter ili la homvarmo kaj viveco de la roluloj.

La ama/amora triopo ĉefrolanta en *Fadenoj* preterdube lokas ĝin ekster la tradicia



kristana mondbildo, moralo. Ĉi-romane la aferoj okazas en mondo kiu mutacias, paŝas postmodernen. Forfalas eĉ senĝene la pekideoj kaj kulp-turmentoj de longaj jarcentoj.

Jam oni komentis: ke efektiva pastro verkas tian romanon estas perpleksa. Tamen, la literatur-teorio postulas nepran disigon inter la verkanto reala kaj la aŭtoro implica. Octavio Paz trovis ke budhisma monaĥo tute lertis en la verkado de

erotikaj versaĵoj: la piulo ne malpli piis pro tio.

Kiel erotika romano *Fadenoj* certe ne elstaras. La veraj seks-scenoj plenigas nur kelkajn paĝojn. Pintaĵo okazas kiam la triopo fakte triope amoradas.

La triopo konsistas el masklo, Anton (kiu foje eĉ "sentis sin iaspeca paŝao"), kaj du inoj, Sonja kaj Ike. Ili estas neder-

landanoj, kiuj preskaŭ arketipe trovas sian idilion en dolĉo de la Sudo (Italio). Malgraŭ certa nivelo de klereco, laŭ ĉiuj indikoj temas pri sufiĉe ordinaraj homoj. Tia triopa "paro" ne estus raraĵo en la epoko kaj etoso de hipioj... kaj la afero ĉefe okazas ja inter 1969 kaj 1971. Pri tiaj eksperimentoj jam abunde verkis Jack Kerouac; kaj li pli esence, eĉ heroe, vivis sur la vojo...

"Kia lukso, povi ami du virinojn": jen koncize Anton. Nu, en la mondliteraturo, jam malkovris tion d-ro Ĵivago. Nur ke li ne samtegmentis nek samvojis kun la du.

Fadenoj duarange belas kiel vojaĝ-romano. La emo "gigante vagadi" forte ligiĝas al la romanaj romantiko kaj erotiko. Temas pri vojaĝado eŭrope civiliza, kun interesa nuanco: tiu de pilgrimado, sugestita plurloke. La klasika mondo ne malofte elbobelas el la romana grundo, kaj citaĵoj en la latina ne forestas. Spuroj ja de la reala verkinto.

Forte skuas la triopan idilion la homnato: verŝajne ĵaluzo-sentoj inter-inaj. Eble tie oni kredus spuri implican moralan vidpunkton, de la pastro Berveling. Kia maniere ŝanĝi la moralon se la homo eterne restas nature sama? Tamen roman-fine la triopo denove montras fortan volon plu-kuni kaj pluvoji.

Petro Braŭn · Usono

Kiu ĝin faros?

Maigret hezitas. Krimromano (1968). Georges Simenon (1903-89). El la franca trad. Daniel Luez. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999. 128p. 20cm. € 6,80.



labor-kolegoj. La pip-fuma detektivo paci-ence intervjuas ilin, igante nin transigi niajn suspektojn de unu al la alia. Tial dialogoj — trafe lakonaj sed rivelaj — konsistigas grandan parton de la verko. Per tio, kaj minimumaj kromaj priskriboj, la aŭtoro vivigas al ni la rolulojn: iliajn psikajn statojn, rilatojn, motivigojn kaj motivojn. La nuna verko diferenciĝas de kutimaj krim-romanoj en tio ke la murdo fakte okazas nur je la dutriona punkto en la libro. Ni scias, pere de anonimaj mesaĝoj, multe pli frue pri la krim-intenco ol ĝia plenumo. Do, la kliŝa ĝenro-epiteto "Kiu-ĝin-faros?" transformiĝas al "kiu-ĝin-faros?" aŭ eĉ "kiu-kion-faros?", ĉar ni ricevas la intencon pli frue ol la viktimon. La traduko estas flua kaj ĝuebla.

Stefan MacGill · Hungario

*La ĉashundo de la Baskerviloj de Arthur Conan Doyle (vidu '99 dec., p. 217)

Post Sherlock Holmes*, sekvas de la eldonejo Sezonoj Komisararo Maigret. Simile, ĝi elvokas pasintan epokon, ĉi-foje Parizon de la sesdekaj jaroj. Ni havas tipan medion por familia murdo-dramo kun limigita nombro da suspektablaj rolantoj: la familianoj plus servantoj kaj



Kun viaj kontribuaj
sendu, se eble, ankaŭ ilus-
tran materialon — koran dankon!

Flugu kun mi al la

**57-a Internacia
Junulara Kongreso**

29 julio – 5 aŭgusto
Strasburgo, Francio



Plurlingvismo en Eŭropo:
kiel ĝin sukcesigi?

<http://purl.org/net/ijk2001>

Esploro pri ĉiuj konataj Zamenhofoj

La familio Zamenhof. Zofia Banet-Fornalowa (1929). La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 2000. 226p. 21 cm. € 21,00.

Pluraj aŭtoroj jam verkis pri la vivo de L. L. Zamenhof: E. Privat, M. Boulton, A. Holzhaus, N. Z. Maimon (en Esperanto), R. Centassi - H. Masson (en la franca), M. Ziolkowska (en la pola). Mi mem alportis kelkajn precizigojn en miaj du eseoj *Zamenhof kaj judismo* kaj *L. L. Zamenhof: datoj, faktoj, lokoj*.

Sed ĝis nun ekzistis neniu grava verko pri la aliaj membroj de la vasta familio Zamenhof, kiu multe kontribuis al la disvastigo de la internacilingva ideo. Ekde nun ekzistas tiu libro interesa, valora kaj ege bezonata. Esplorante la vivon kaj karieron de ĉiuj konataj Zamenhofoj, la aŭtorino plenumis grandegan laboron, pri kiu ni devas esti dankaj kaj gratulaj.

Ĉiu el la 15 ĉapitroj estas dediĉita ĉefe al unu membro de la familio. La unua koncernas Markon, la patron. La sekvantaj priskribas la vivon de la aŭtoro de Esperanto, de lia edzino Klara Zilbernik, de iliaj infanoj (Adamo, Sofio, Lidja), kaj de la gefratoj de Lazaro (Felikso, Henriko, Leono, Aleksandro, Fania, Aŭgusta, Ida).

Mirige, la gefratoj de Lazaro ne sinsekvas kronologie: venas unue la viroj, nur poste la virinoj (maljusta masklofavoro!). La lasta ĉapitro estas dediĉita al la nepo Louis Christophe Zaleski-Zamenhof.

Sed ĉiu el la ĉapitroj koncernas ne nur unu familianon, sed ankaŭ ties posteularon: gefiloj, genepoj kaj eĉ geprenepoj. Tiel, estas menciitaj eĉ du Zamenhofaj knaboj naskiĝintaj en 1989: Alexander kaj Adrian.

Genealogia arbo, nepre kompleta kaj utila, troviĝas ĉe la komenco. La fotoj estas sufiĉe multaj kaj bonkvalitaj, kvankam pluraj el ili estas malnovaj.

La aŭtorino konscias ke ŝia laboro ne


estas kompleta. Evidente, tiel ampleksa laboro neniam povas esti kompleta. Ĝi tamen entenas gravajn informojn, kiujn en aliaj fontoj oni vane serĉus, aŭ trovus tre malfacile.

La datoj estas donitaj (normale) laŭ la gregoria kalendaro. Sed enŝoviĝis kelkaj eraroj. Ekzemple, la indikita dato de la naskiĝo de Marko Zamenhof estas "27-a de januaro 1837". Fakte, tiu dato estas konforma al la julia kalendaro; laŭ la gregoria, li naskiĝis la 8-an de februaro (A. Holzhaus, *Doktoro kaj lingvo Esperanto*, p. 7). Plie, li mortis la 30-an de novembro 1907 (Holzhaus, p. 17), kaj ne la 29-an. Ankaŭ la tago en kiu la juna Lazaro festis la naskiĝon

de la *Lingve Universala* estas la 17-a de decembro (letero al Borovko), ne la 15-a.

Mi faras nur du etajn kritikaĵojn. En ĉiu ĉapitro, grase presitaj subtitoloj ege faciligus la konsultadon. Mi bedaŭras ankaŭ ke la aŭtorino ne juĝis miajn du pri-Zamenhofajn verketojn indaj troviĝi en ŝia bibliografio; kvankam ilin eldonis ne fama eldonejo, ili ja povas alporti kelkan utilon.

André Cherpillod · Francio



ĈU VI JAM REKOTIZIS POR 2001? SE NE,
TIU ĈI ESTAS LA LASTA NUMERO DE NIA REVUO KIUN VI ANKORAŬ RICEVAS!

Multe pli ol heroldo

Gaston Waringhien 1901-1991.

Heroldo de la internacia lingvo.

André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 2000. 79p. 21cm. Dulingva: E-franca. € 8,70.

Jen interesa libro, ekde nun nemalhavebla al ĉiuj kiuj interesiĝas pri Waringhien, la homo kiu, kune kun sia amiko Kalocsay, "post Zamenhof mem (...) plej efike laboris por igi Esperanton kulturlingvo" (p. 4). Kun amo kaj admiro, sed ankaŭ kun iom da akademieca pedanteco, la aŭtoro prezentas diversajn facetojn de la Waringhiena verko, la konsternan amplekson de lia verkaro kaj, tiom kiom decas, lian personan vivon.

Oni ekscias interesajn detalojn pri lia militkaptiteco, pri liaj framasoneco kaj politika engaĝiĝo.

Aspektas iom strange, sed estas ja en la spirito de la plena lingva demokratio, la originalaj transskriboj en la hebrea, araba (p. 18) kaj persa (p. 34). Mi demandas min kiom da esperantistoj kapablas ilin legi? Cetere, la antaŭnomo de la fondinto de *Literatura Mondo* estas ne Tividar (p. 26), sed Tivadar. Same stranga, sed almenaŭ plenkonscie plenumita, estas la ĉefna aldono de la horoskopo de Waringhien, kiu "mem estis tro decideme racionalisto, ke li havus ian estimon al astrologio" (p. 66).

Post la erudicia prezento de la pseŭdonimoj de Waringhien, mi sentas kiel mankon la mencion sur la sama paĝo (28) de Lajos Totsche inter la redaktoroj de *Lite-*

ratura Mondo kaj de Lajos Tárkony inter la kunlaborintoj al *La Nica Literatura Revuo*, sen precizigi ke temas pri unu kaj sama persono.

Mi devas konfesi ke ĉion ĉi mi rimarkis nur je la dua kaj postaj tralegoj. Je la unua fojo mi tralegis la libron senspire, fascinite de la personeco de ĝia eksterordinara heroo. Waringhien estis multe pli ol heroldo, multe pli ol heroo (mi supozas ke Cherpillod elektis la titolon pro la franclingva homonimeco de tiuj du vortoj). Li estis vera evangeliista apostolo, unu el "la du kolonoj de l' templo" (p. 10), la homo kiu, en la antaŭparolo al la *Parnasa Gvidlibro*, ne povis malkonfesi la ĝojon ke li partoprenis en tri el la kvar nemalhaveblaj laboriloj de la lingvo: la Vortaro, la Grammatiko, la Retoriko kaj la Poetiko.

Jozefo E. Nagy · Rumanio

Laste aperis

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdatan katalogon de haveblaj varoj konsultu ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Aventuroj de pioniro.

Edmond Privat (1889-1962). La Laguna: J. Régulo (1962; irana represo). 143p. 19cm. Fotoj. Stafeto: Beletraj Kajereroj 17. 55 mallongaj radio-prelegoj, kiuj skizas la kareeron, movadan kaj nemovadan, de unu el la plej gravaj intermilitaj aktivuloj. € 13,50. Triona rabato ekde tri ekz.

Bardo, La. La Epoko: Kajero 143(38). Ichok Lejbuŝ Perec (1852-1915). El la jida trad. Tomasz Chmielik. Svidniko, 1993. 10p. 28cm. Novelo de unu el la tri fondopatroj de la juda literaturo, moderna romanistikisto. € 3,30.

Epoko, La. Kajero 6. Bogdan Wojdowski (1930). El la pola trad. Tomasz Chmielik. Svidniko, 1990. 16p. 28cm. Fragmento el, kaj prezento de, romano (1971) pri la getto de Varsovio. € 3,90.


Epoko, La. Kajero 7. Bruno Schulz (1892-1942). El la pola trad. Tomasz Chmielik. Svidniko, 1990. 23p. 28cm. Fragmentoj el la rakontaro *Cinamovendejoj* (1934) de prozisto Kafka-simile avangarda. € 3,90.

Epoko, La. Kajero 8. Andrzej Szczypiorski (1924-2000). El la pola trad. Tomasz Chmielik. Svidniko, 1990. 35p. 28cm. Pri la romano *La komenco* [vidu jan., p. 15]: fragmento, eseo (Marta Wyka), intervjuo (Jan Stanisław Skorupski). € 4,20.

Epoko, La. Kajero 9. Janusz Korczak (1878-1942). El la pola trad. Tomasz Chmielik. Svidniko, 1990. 22p. 28cm. Prezento de granda pola edukisto per fragmentoj kaj eseo. € 3,90.

Epoko, La. Kajero 10. Antoni Libera, Marek Kędzierski k. a. El la pola, angla kaj franca trad. Tomasz Chmielik. Svidniko, 1990. 56p. 28cm. Pri Samuel Beckett, kun fragmentoj el *Atendante Godoton*. € 6,90.

Epoko, La. Kajero 11. Timothy Garton Ash, Lech Wałęsa k. a. El la pola kaj angla trad. Tomasz Chmielik. Svidniko, 1990. 58p. 28cm. Divers-ĝenre pri la pola protest-movado Solidareco. € 6,00.



Serĉu historiajn radikojn kun Privat, erojn da klero kun 37 doktuloj, aŭ ĝuon aŭskultan kun Bronŝtejn kaj broKANTAJOJ.

Epoko, La. Kajero 13: Rusujo en kirlo. Natalia Ivanova k. a. El la rusa kaj pola trad. Tomasz Chmielik. Svidniko, 1990. 30p. 28cm. Pri la ŝanĝoj kiuj kolapsigis Sovetion. € 4,20.

Epoko, La. Kajero 14. El la angla, ĉeĥa, germana trad. Tomasz Chmielik. Svidniko, 1990. 33p. 28cm. Tri famaj tekstoj: *Naciismo* (1979) de Isaiah Berlin (1909-2000), parolado en la konferenco "La anatomio de malamo" (1991) de Václav Havel (1936) kaj *Tiuj malbenitaj germanaj problemoj* (1990) de Günther Grass (1927). € 4,20.

Epoko, La. Kajero 15. El la pola trad. Tomasz Chmielik, Kris Long. Svidniko, 1990. 28p. 28cm. Romanfragmento (1986) de Elie Wiesel (1928). Poemoj (1945) de Czesław Miłosz (1911) kaj diskut-vekinta artikolo (1987) de Jan Błoński pri la rilato de poloj al la Holokaŭsto. € 4,20.

Epoko, La. Kajero 16. Svidniko, 1990. 30p. 28cm. Intervjuo (1989) de Tomasz Chmielik kun Ulrich Lins pri *La danĝera lingvo*. € 4,50.

Epoko, La. Kajero 19: Naciaj konfliktoj en orienta kaj meza Eŭropo. El la angla trad.

Tomasz Chmielik. Svidniko, 1990. 24p. 28cm. Studo de Józef Darski el 1990. € 3,90.

Epoko, La. Kajero 20. Adam Michnik (1946). El la pola trad. Tomasz Chmielik. Svidniko, 1990. 30p. 28cm. La artikolo *Kial mi ne voĉdonos por Wałęsa?* (1990). € 4,20.

Esperanto (1973). Pierre Janton (1933). El la franca trad. Mohammad-Djavad Kamali. Tehran: Atai, 1998. 189p. ISBN 964 313 035 5. 24cm. Perslingva. Analizo de Esperanto, kun resuma historio de ĝiaj literaturo kaj movado. € 12,00.

Esperanto. Kalyk kuspo kylja ucbebnik. *Kurso de Esperanto por udmurtoj.* Bronislav Ĉupin. El la rusa trad. Aleksandr Laptev. Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 2000. 79p. 20cm. La unua E-lernilo por duonmilion-opa urala popolo. € 4,20.

Esperanto 1. *Internacia lernolibro por la lerneja junularo.* István Szerdahelyi (1924-87). Budapest: Tankönyvkiadó, 1972 (irana represo de la 3-a tralaborita eldono). 260p. 24cm. Ilus. Plej taŭga por klasa instruado. 24 lecionoj por du lernojaroj. Klasikaĵo aperinta jam en 80 mil ekzempleroj. € 13,50.

Jarkolekto Esperanto 2000. Rotterdam: UEA, 2000. 220p. 27cm. Bind. 11 numeroj. € 24,00. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Kiam bestoj parolis. Rakontoj el Afriko. Div. afrikaj aŭtoroj. Red. Katelina Halo kaj Anna Löwenstein. El afrikaj lingvoj trad. pluraj. Fondaĵo Afriko, 2000. 23p. 30cm. 23 popolrakontoj el 8 landoj. € 3,00. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Kitelo, La. La Epoko: Kajero 143(33). I. L. Perec. Vidu ĉe *La bardo*. 17p. € 3,60.

Linguistic Communication. A Comparative Field Study. Claude Piron (1931). Rotterdam: UEA, 2000. 23p. 22cm. Esperanto Document 46A. Komparo de la diversaj sistemoj de internacia komunikado laŭ dek tri kriterioj. € 2,10. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



BRAZILIO: Du E-delegitoj

Organizita kontrapunkte al la Ekonomia Forumo de Davos, la Monda Socia Forumo (25-30 jan., Porto Alegre) kunigis ĉ. 3000 delegitojn de miloj da neregistraj organizaĵoj kaj dekmilion da aliaj aktivistoj. La francaj esperantistoj Gérard Paing kaj Henryka Olek aliĝis kiel anoj de verdula partio. Kune kun ili, la lokaj e-istoj distribuis multe da reklamiloj pri E-kursoj: utile, ĉar "pluraj pensis ke Esperanto estas mortinta", kaj nur "kelkaj anarko-punkoj en junulara kampadejo sciis ion pri Esperanto kaj utiligis ĝian nomon kiel nomon de sia lando". (M. Boeira Vianna kaj Sendependa Komitato de Informadoj)

Radio-stacio de Rio-de-Janeiro elsendas E-kurson laŭ la metodo *Aŭdu kaj Lernu* de Sylla Chaves en ĉiu dimanĉa mateno de februaro. Rete: linguadafaternidade@bol.com.br. (F. Henrique, NUN)

FRANCIO: Domo por Eŭropo

En la lasta komitatkunsido de Kulturdomo Grésillon leviĝis la

propono ŝanĝi la nomon de la asocio al "Kulturdomo de Eŭropaj (ne plu: Francaj) Esperantistoj". Ĉar por tio necesas ŝanĝo de la statuto, la propono iros al la venonta ĝenerala asembleo. La Kulturdomo (kastelo.gresillon@free.fr) sendas regulan inform-cirkuleron al petantoj. (H. Boyet, Ret-Info)

Kastelo Grésillon



La renovigita Kastelo Grésillon organizas internacian renkontiĝon por infanoj (inter 6 kaj 15 jaroj, ankaŭ komencantoj) de 14 ĝis 21 aprilo. La kosto, por infano aŭ plenkreskulo, estas ĉ. € 122. Kontakto: Elisabeth Barbay, 25 allée Gabriel Fauré, FR-93140 Bondy; [+33/148-47-23-87](tel:+33148472387); Eliz.Barbay@wanadoo.fr.

HUNGARIO: Krei tegmenton

En renkontiĝo la 2-an kaj 3-an de dec. en Zalaegerszeg, reprezentantoj de pluraj hungaraj Esperanto-organizaĵoj — i.a. Hungaria E-Asocio (la landa asocio de UEA) kaj Kultura E-Asocio (eldonanto de *Eventoj*) — interkonsentis plani kaj fondi teg-

mentan stablon. Preta kaj detala projekto restas ellaborenda. (B. Vaha)

JAPANIO: Dek mil membrojn!

En sia novjara saluto en *La Revuo Orienta*, SIBAYAMA Zyun'iti, la prezidanto de la estraro de Japana E-Instituto, difinas kiel "mejloŝtonon" atingindan por la landa asocio JEI la membro-nombro "dek miloj" (JEI nun havas ĉ. 1400 anojn) kaj sugestas konsideri organizadon de UK en Japanio. (La unua kaj ĝis nun lasta UK en Japanio okazis en 1965, Tokio.)

KANADO: Sperta skipo

Post eksmembrigo de estrarano printempe de 2000 (vidu apr. '00, p. 77), last-aŭtune demisiis el la estraro de Kanada E-Asocio — pro tempomanko — Matthew Chisholm kaj prezidanto Ciprian Jauca. Tamen, sub la nova KEA-prezidanto, Brian D. Kaneen, funkcias nun "kompetenta, laborema kaj sperta estrara skipo" — laŭ "suplementa numero" de la revigliganta asocia organo *Lumo*, kiu anstataŭas la ne aperintajn numerojn de 1996-97.

UKRAINIO: Krea UkrEA


En la 11-a Kongreso de Ukraina E-Asocio (3-5 nov., Kievo, )

IRANO: AMPLEKSA VERKO DE AZARI

Pli ol 20-jaran laboron de la pionira e-isto Aref Azari (tria de dekstre) kronis festeto kun 45 samideanoj en Irana

E-Centro (Teherano), la 12-an de jan., je la apero de lia *Ampleksa Esperanto-Persa Vortaro*. Oni donacis ekzem-

plerojn al la labor-teamo de IEC: Fariba Nuri Majd (unua de dekstre), ĉefrespondeca pri la kompostado, pro ŝia helpado pli ol dek jarojn pri la reviziado kaj enordigo de la manuskripto; inĝ. Nazi Solat, pro ŝia kontribuo pri la scienc-teknikaj terminoj; M. Reza Torabi (kvina de dekstre), pro lia eldon-pre-tiga laboro; inĝ. Abbas Baggestani (sesa), pro lia teknika kompost-helpo; Mahmud Mirbozorgi kaj Simin Emrani (dua resp. sepa), pro ilia kontrollegado. Kvara de dekstre staras Abdollah Hakimnejad, verkinta la enkondukon.



Komplezo de M. Reza Torabi

GERMANIO: Jarŝanĝo en familia rondo

Pli ol ducent E-parolantoj kolektiĝis en Trier (Germanio) por ĝui la kulturon de sia lingvo en la 17-a Internacia Festivalo (27 dec. - 3 jan.). La ĉeftemon "Esperanto kaj infanoj" prezentis Amri Wandel, UEA-komisiito pri Rondo Familia, rondo kuniganta ĉ. 300 E-parolantajn familiojn precipe per sia cirkulaĵo *Familia Esperanto*. Jouko Lindstedt lingviste traktis la demandon "Ĉu denaskuloj ali-formos la lingvon kaj la movadon?". Viglis diskutoj pri metodoj kaj spertoj de E-instruado al infanoj. Pri la altkvalita programo por infanoj kaj gejunuloj zorgis ĉefe Christoph Frank, profesia magiisto/puĉteatraro.

La 18-a IF okazos ĉirkaŭ la jarŝanĝo en Magdeburgo; informas Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio; QHDP@internacia-festivalo.de. (J. Lindstedt, A. Wandel)



Christoph Frank,
profesia magiisto

42 partoprenantoj el 18 urboj), konstatigis nombra kaj kvalita kresko de la 186-membra UkrEA. Oni elstare menciis la laboron de Volodimir Pacjurko, kies grupo preparas plenan vortaron E-ukrainan, de Vasilj Sta-

noviĉ, dank' al kiu UkrEA havas ukrainan-E-vortaron kaj E-programon por lernejoj, kaj de Mikaelo Lineckij, kiu popularigas la lingvon en Kievo. Kiel prezidanto de UkrEA reelektiĝis Volodimir Hordijenko. (K. Demjanenko)

Laste aperis

(daŭrigo de p. 35)

Marĉo. *La Epoko: Kajero 143(36)*. I. L. Perec. Vidu ĉe *La bardo*. 18p. € 3,60.

Maskerado. *Dancing around Death in Nazi Hungary*. Tivadar Soros (1894-1968). El Esperanto trad. kaj editoris Humphrey Tonkin. Edinburgh: Canongate, 2000. 11+275p. ISBN 1 84195 062 9. 23cm. Anglalingva. Bind. Kun fotoj. Kiel la fondinto de *Literatura Mondo* transvivis kun sia familio la Holokaŭston kaj la sieĝon de Budapeŝto en 1944-45. (Vidu nov. '00, p. 197.) € 24,00.

Memorlibro. *Kolekto de la prelegoj dum solena internacia konferenco organizita okaze de la tridekjariĝo de la universitato fako Esperantologio (Budapeŝto, 17/18-04-1997)*. Red. Tamás Gecső, Zsuzsa Varga-Haszonits. Budapest: Universitato Eötvös Loránd, 1998. 495+11p. ISBN 963 7647 66 X.

24cm. 41 prelegoj pri temoj de la Esperantaj lingvo, literaturo, kulturo, movado kaj instruado. € 27,00.

Pipo de la rabeno, La. *La Epoko: Kajero 143(31)*. I. L. Perec. Vidu ĉe *La bardo*. 13p. € 3,30.

Pri historio. *La Epoko: Kajero 143(41)*. I. L. Perec. Vidu ĉe *La bardo*. 13p. € 3,30.

Rund um die Welt - Zi vol Lölik: 1888-1892. *Zeitschrift für Volapükisten und solche, die es werden wollen*. Ĉefred. Siegfried Lederer (1861-1911). Postparolo de Reinhard Haupenthal. Hildesheim: Georg Olms, 2000. 764p. ISBN 3 487 10152 1. 30cm. Germanlingva. Tole bind. Represo de la 4 jarkolektoj de aprilo 1888 ĝis marto 1892. € 177,00.

Sentinelles, La, 1920. 1-4. *Iam kompletigota verkaro de E. Privat. Artikoloj. Kolekto 8*. Red. Tomasz Chmielik, Claude Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidniko: Arĥivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 251p. Kvin kajeroj. 28cm. Francilingva. Artikoloj el grava jaro de

la eŭropa historio, aperintaj en la socialista taggazeto *La Sentinelle*. € 27,00.


KOMPAKTAJ DISKOJ

Iom da bono de Bruna Ŝtono. Mikaelo Bronŝtejn (1949). Tihvin, 2000. 78min. 22 kanzonoj de ruslanda bardo. Disko kompilita el liaj tri sonkasedoj (1992, 1993, 1997). € 13,50.

Jen venas... Esperanto Desperado. **broKANTAĴOJ.** Muziko kaj tekstoj de Amiro (Amir Hadziahmetovic), Kimo (Kim J. Henriksen) k. a. Donnevill: Vinilkosmo, 2000. 13 kantoj. 47 min. Dana/pola/bosnia grupo ludas kantojn ritmajn kaj humurajn, ĉerpante ankaŭ el la repertuaro de Amplifiki. € 15,00.

Bonvolu noti ke ekde la 1-a de jan. 2001 la aldonvalora imposto je ne-libraj varoj (diskoj, insignoj k.s.) altiĝas de 17,5% al 19%.

1 vorto = 1 internacia respondokupono (€ 0,73). Ni ne respondecas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton. Pri korespondpetoj zorgas ankaŭ Koresponda Servo Mondskala, B. P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio; www.multimania.com/kosomo.



ANONCETOJ

NELLI KUBLANOVA bondeziras al la geamikoj okaze de veno de nova jarmilo, kaj petas kontakti ŝin laŭ la nova adreso: Kirschenallee 6-F, DE-14469 Potsdam, Germanio.

HELPON DE VETERANAJ kaj lertaj e-istoj ŝatus akiri la dek-persona E-rondo Aglido-Agado: Wen hua lu 81 hao, Zaozhuang, CN-277102, Shandong, Ĉinio.

(RE)ABONU FONTO-N! La sola sendependa monata literatura revuo en Esperanto, **FONTO**, en januaro komencis sian 21-an jarkolekton: numeroj 241-252. Aperas 12 numeroj jare — sendataj ĉiam po du samkoverte. Kun riĉa kaj varia enhavo. Por la tuta jaro 2001 tio kostas nurajn 60 guldenojn! Pagu al la UEA-konto "bays-f" kaj samtempe informu la redaktoron

Gerrit Berveling (Mussenhage 8, NL-8011 BH Zwolle, Nederlando; gerrit.en.madzy@planet.nl). Perantoj en pluraj landoj. Ankaŭ ĉiuj antaŭaj jarkolektoj estas ankoraŭ haveblaj: nemalhavebla kaj riĉega fonto de la literatura E-historio de la lastaj 20 jaroj! Ĉiu jarkolekto 60 guldenojn; pri rabato por la tuto samtempe eblas interkonsenti.

KIAM MALVARMAS aŭ oni timegas, iuj parolas pri "anser-haŭto". Ĉu simila esprimo en via lingvo...? Se jes, bv. sendi ĝin al la 12-jaraj E-klubanoj de Jacques Ferroul (jaef@voila.fr), kun proksimuma prononco kaj laŭvorta E-traduko, prefere letere (Esperanto-Klubo, Collège Louis Pasteur, 48 Bd. Paul Claudel, FR-13009 Marseille, Francio), eventuale rete (ekolopo@voila.fr).



HILELISMO: Rondo fondita

Laŭ iniciato de Mato Ŝpekuljak fondiĝis hilelista E-rondo, kun la TTT-ejo <http://www.geocities.com/hilelistarondo/>. Por ricevi "Deklaracion de hilelisto", elaboritan de la rondo, projekton de la Statuto de Tutmonda Hilelista Asocio, aŭ por aboni la bultenon *Hilelisto* (ekzistas senpaga ret-poŝta versio), kontaktu la kunordiganton: Oštarijska 8, HR-10000 Zagreb, Kroatio; ✉mato.spekuljak@zg.tel.hr. Unua Hilelista Renkontiĝo estas planata por Zagrebo, dum la UK.

NEFUMISMO: Ministra strebo

"Strebanke kiel eble plej bone protekti kontraŭ nedezirata elmetiĝo al tabakfumo la nefumantan plimulton nialande", la nederlanda san-ministrino Els Borst-Eilers proponas precizigojn pri fum-malpermeso en publikaj transportiloj, en sia leĝ-modifa propono baldaŭ traktota de la

nederlanda parlamento — tion ŝi respondis al letero de UEA-delegito Bart Ruigrok, en kiu li referencis al la agado de TADEN (Tutmonda Agado/Asocio de E-istaj Nefumantoj, p/a Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, Nederlando).

TADEN informas pri novaj evoluoj fum-rilataj per sia organo *Puraj Pulmoj* (senpaga provnumero), kolektas diverslandajn adresojn ĉe kiuj plendi pri fumĝeno, kaj planas kompili bibliografion kaj terminaron.



ROTARIO: Brazila sciigo

En septembro 1999 la organo de la francaj rotarianoj, *Le Rotarien* (40 mil ekz.), publikigis kvarpaĝan artikolon de Eskil Svane, "Esperanto, lingvo sen landlimoj". Tradukite al la portugala, ĝi nun aperis en la januara numero de la revuo *Brasil Rotário* (56 mil ekz.). Informojn pri Rotario kaj E-o donas Rotaria Amikaro de E-istoj, p/a Marc Levin, 30, rue M. de Lattre de Tassigny,

FR-69009 Lyon, Francio, ✉levinmar@club-internet.fr. (E. Svane)

SCIENCO: Renoma KAEST renomita

Kolokvo "Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" (KAEST, Prago, 10-12 nov.) estis aranĝita de Ĉeĥa E-Asocio, sub aŭspicioj de UEA, kiel kontribuo al Kampango 2000. En tri sinsekvaj sekcioj kun entute 21 kontribuoj ("Ekonomio sojle al la tria jarmilo", "Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de E-o" kaj

"Scienco kaj tekniko ĝenerale") partoprenis 41 personoj el 11 landoj. Ĉe ronda tablo oni diskutis la estontecon de KAEST, ŝanĝante ĝian nomon de "kolokvo" al "konferenco" kaj fiksan ĝian sekvan daton al 8-10 nov. 2002.

La kolokvon antaŭis apud Prago seminario pri fervoja terminologio sub aŭspicioj de IFEF, kun nur 8 partoprenantoj, kiuj tamen kontentis diskuti pri terminaraj problemoj sen tempa premo. (P. Chrdle, Ret-Info)

EUROPA AGADO: Klara parolo

En decembro aperis 103-paĝa, hungarlingva libreto de UEA-ano László Gados pri la eŭropa lingvoproblemo, *Egyenes beszéd — nyelvügyben* ("Klara parolo pri lingvo"). Ĝi traktas la problemon el ekonomia vidpunkto, montrante la avantaĝecon de Esperanto, kaj esploras la fenomenon de tutmondiĝo kaj ties lingvan efikon helpe de multaj citaĵoj. La libro fine tezas ke la eŭropaj lingvokomunumoj povos efike defendi siajn lingvojn kontraŭ la sama minaco nur komune, uzante ankaŭ komunan neŭtralan lingvan ilon, Esperanton. Tio realiĝos nur se unuopuloj aŭdigos sian voĉon, por ke EU, aŭ eĉ Eŭropa Konsilio, difinu ian oficialan statuson por Esperanto. La kernaj ideoj de la libro troviĝas ankaŭ en E-lingva broŝuro (vidu http://home.t-online.de/home/Ulrich.Matthias/brosx_eo.htm).



Oficiala informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: Jader Rodrigues da Silva. **Francio:** Sonia Amariglio; René Ballaguy. **Germanio:** Henning van de Loo; Ina Tautorat. **Japanio:** TSUDA Masao. **Korea Resp.:** Kim Yoo Young. **Luksemburgio:** Jean-Marie Ries. **Nederlando:** W. F. Huppertz. **Pollando:** Krystyna Babiarz. **Vjetnamio:** Pham Mai Lan. **Usono:** Aleksandro Gofen; Lee A. Miller.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

SUBTENANTOJ (min. \$25): **Brazilo:** Cleber de Moraes Lemos. **Meksiko:** Julie L. Regal. **Usono:** Antonio Gomez; Doroteo Holland.

AMIKOJ (min. \$10): **Japanio:** Anna M. Steffes. **Usono:** D. Gary Grady; Henry L. Ginn; Larry M. Gregg; Jerry Johnson.

PATRONOJ DE TEJO 2001

Argentino: Mariano D. Ibáñez; Miguel Angel Ruffi-

nengo. **Brazilo:** James Rezende Piton; Jader Rodrigues da Silva. **Finnlando:** Tiina Oittinen. **Francio:** Alain Pialla; Michel Cavelan; Bérangère Cheverry; Claude Longue-Épée; Denise M. H. Loisel; Gaston Fournier; Henri Roy; Jacques Decobert; Pierre Cheynet; Renée Triolle; Bert Schumann. **Germanio:** Franz Knöferl; Rokuro Makabe; Maria Vitalyos; Franziska Reisel. **Israelo:** Jehoŝua Tilleman. **Italio:** Gianfranco Polerani. **Japanio:** HUKUMOTO Hiroto; Mayumi Kinoshita; KODAMA Hiroo. **Nederlando:** Danny ten Haaf; Hans ten Hagen; J. Soeteman; Louise Adelaar; Marc van Oostendorp; Saskia J. A. Idzerda. **Usono:** Doris Vallon-Wheeler; D. Gary Grady; June Knudsen-Fritz.

SOCIETO ZAMENHOF 2001

Argentino: Mariano D. Ibáñez; Miguel Angel Ruffinengo. **Aŭstrio:** Sieglinde Stamm. **Britio:** Geoffrey Sutton. **Finnlando:** Kristiina Hautamäki; Veikko Tikkanen. **Francio:** André Loisel; Claude Longue-Épée; Denise M. H. Loisel; Féodor Jelenc; Auguste

Huberdeau; Hélène Gauduchau; Henri Roy; Jeannine Croze; Jean-Paul Beau; Louise Marin; Maurice Suet; Odette Bernet; Raymond Boré; Sonia Amariglio; Jean-Louis Texier. **Germanio:** Alexander Putze; Elfriede Kruse; Martin Gröndler; Heinrich Nischwitz; Helga Erhard; Helmut Welger; Julie Winter; Helmut Klünder; Rokuro Makabe; Oliver Walz; Richard Hirsch; Michael Scherm; Werner Bormann. **Hispanio:** Josep Franquesa Solé; Pere Julià. **Israelo:** Josifa Rabino. **Japanio:** HUKUMOTO Hiroto; Mituo Gotou; Kyōhei Nakazima; Nobuo Sakurai; Kōiti Simizu; SIMADA Sunao; TAKEUTI Yosikazu. **Luksemburgio:** Brian R. Moon; Claude Nourmont. **Meksiko:** Julie L. Regal. **Nederlando:** Danny ten Haaf; G. A. M. v. Bergeijk; G. F. Makink; Huibert Oortwijn; Hans ten Hagen; E. C. Klaver; Louise Adelaar; Joop W. Moonen; Marc van Oostendorp; Simon P. Smits; S. van Westrhenen; Wiebren Akkerman; W. C. Keizer. **Norvegio:** Kjell Peder Hoff. **Slovakio:** Helena Seres. **Svedio:** Gunnar Olsson; Martin Häggström; Inga-Maj Lindkvist; K. G. Lennart



Litova sesdeko

Per la kajero nov.-dec. 2000, *Litova Steło* atingis sian 60-an numeron ekde la relanĉo en 1990. Laŭ propra statistiko, la revuo havis 433 abonantojn en 2000, inkl. okdekon da senpagaj ricevantoj. Tio estas pli ol duoblo de la abonantaro en 1994 (201), sed malpli ol la rekordo en 1997 (595).

Devi dulingva

La 7-an de nov. estis prezentita en la Barcelona Unesko-klubo du novaj libroj de Vimala Devi: la portugale-katalune dulingva poemaro *éticas.étiques* kaj la E-lingva novelaro *Musono* (vidu sep. '00, p. 157). (KAE-Infomilo)

Prem-memoro el Bazono

En la multflanka jarkvarona revueto *Bazono* (p/a Asocio de Esperanto, CP 1111, RO-3400 Cluj-

Napoca, Rumanio; mendebla per 1 respondukupon por ĉiu n-ro), Ionel Oneț rememoras pri Zamenhof-taga ekspozicio antaŭ 17 jaroj, kiun li aranĝis, kaj kiun la sekur-polico malpermesis kiel "kontraŭleĝan propagandon". Oneț estis alvokita "kunlabori" kun la polico kaj, kiel tiama sekretario de la loka E-klubo, forigi el ĉi tiu la nerumanajn membrojn; li rifuzis fari ambaŭ.

Sep paĝojn por KLEKS

La eldonejo KLEKS de Georgo Handzlik (kiu eldonis *Higieno de l' murdisto*, *La lada tambureto*, *Marta* ktp.) planas kunlabore kun E-lingva Verkista Asocio pretigi por la Zagreba UK libron kun ĉ. 25 mallongaj rakontoj de nuntempaj E-verkistoj. KLEKS invitas kontribui ĝis 30 apr. per rakontoj ne pli longaj ol 7 tajpopaĝoj, akompanataj de aŭtoraj biografieto. La elekton faros, nome de KLEKS, Handzlik, kaj nome de EVA, Tomasz Chmielik. Kontaktoj: handzlik@kleks.pl, resp. Tomasz Chmielik, ul. Jarzębinowa 3/30, 21-040 Świdnik, Pollando.

Aŭtoraj rajtoj de Piĉ

Laŭ komuniko de Reinhard Hau-

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 21-an de aprilo 2001 (10h00 - 17h00)



- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Bazaro de e-aĵoj

Speciala gasto:
WERNER BORMANN



- ★ Senpaga loterio
- ★ Senhala prezentado de E-filmoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

penthal, la 6-an de dec. (je la 80-jariĝo de Karolo Piĉ), la rajtoj je ĉiuj Piĉ-verkoj kontrakte transiris al Haupenthal, kies skriba konsento de nun necesos por ajna represlo el la Piĉ-verkaro. Edition

Iltis (B.P. 19, FR-84340 Malaucène, Francio; ☎/✉+33/4/90-65-28-33; editioniltis@aol.com) plu zorgos reeldoni la elĉerpitajn titolojn kaj eldon-pretingi la dekduon da verkoj ankoraŭ manuskriptaj.

Lagerkrantz; Malte Gahlin. Svislando: David Cohen. Usono: Arnold Victor; Bruce Arne Sherwood; Christopher Culver; David Wolff; Doris Vallon-Wheeler; Francis Kasper; D. Gary Grady; Gertrude Novak; Thomas H. Goodman; Lucille C. Harmon; Margaret L. Barkley; Prenda E. Cook; William R. Harmon.

DONACIOJ 2000 (EUR)

ĝis la 31-a de decembro

Asocia Kapitalo: Sumo tutjara: 917 940,91.

Afrika Kapitalo: Sumo tutjara: 2642,28.

Fondaĵo Afriko: Francio: Anonime 50,00. Hispanio: R. Uruña de Hernández 150,00. Nederlando: partoprenantoj de Faulhaber-semajnfino 385,74; F. H. Kat 68,07; C. J. K. Schouten 13,61; Fam. den Toonder 20,14; A. S. A. de Vries 45,38; W. Th. J. Zeiss 45,38; F. D. van Zoest 11,35. Svedio: J. Hammarberg 79,59; U. Luin 100,00. Sumo tutjara: 9271,64.

Fondaĵo Ameriko: Brazilo: C. D. M. Lemos 120,00; R. M. M. Lemos 120,00. Nederlando:

Fam. R. H. Bossong 45,38. Svedio: J. Hammarberg 45,55. Sumo tutjara: 3781,44.

Fondaĵo Azio: Italio: Anonime 750,00. Japanio: Esperanto-Rondo de Ehime 19,79. Koreio: landa kongreso 389,69. Sumo tutjara: 5547,74.

Biblioteka Fondaĵo: Sumo tutjara: 167,54.

Fondaĵo Canuto: Aŭstralio: J. R. Bishop 10,00; T. M. Metherall 5,00. Britio: G. B. Forow 4,11; C. A. Shives 10,00. Italio: V. Madella 5,00; L. Oberrauch 5,00; Anonime 750,00. Japanio: A. M. Steffes 9,45. Nederlando: D. van Zanten 27,22. Sumo tutjara: 5299,46.

Konto Espero: Hispanio: L. E. Hernández García 100,00; R. Uruña de Hernández 150,00. Sumo tutjara: 551,49.

Fondaĵo Grabowski: Sumo tutjara: 109,41.

Junulara Fondaĵo: Francio: Thiers Esperanto (PS) 252,42. Sumo tutjara: 2052,90.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Sumo tutjara: 1207,14.

Propaganda Konto: Sumo tutjara: 5,68.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Aŭstralio: J. R. Bishop 10,00; T. M. Metherall 5,00. Britio:

C. A. Shives 10,00; A. Sly 30,00. Germanio: Esp. Klubo FFM 200,00. Italio: G. Denti 9,45; V. Madella 5,00. Japanio: A. M. Steffes 9,45. Pollando: K. Babiarez 200,00. Sumo tutjara: 1625,26.

Volontula Fondaĵo: Aŭstralio: J. R. Bishop 10,00. T. M. Metherall 5,00. Aŭstrio: S. Stamm 22,02. Brazilo: R. Lemos 20,00. Japanio: A. M. Steffes 9,45. Nederlando: G. Peet 22,69; A. M. Oosterwijk 11,34; Y. Weidema 99,22. Norvegio: E. Matland 12,32. Pollando: K. Babiarez 200,00. Sumo tutjara: 810,70.

Kampanjo 2000: Sumo tutjara: 2320,17.

Ĝenerala Kaso: Britio: B. Najbaro 22,30. Germanio: M. Gründler 54,20; R. Klag 1,02; F.-G. Rössler 5,62. Nederlando: P. A. Buijnsters 13,00; L. A. Demmendaal 217,81; F. H. Kat 27,17; G. F. Makkink 357,78; G. C. M. Schavemaker 26,38; A. W. Treurniet 58,64; F. D. van Zoest 11,35. Sumo tutjara: 2509,93.

Al ĉiuj tre koran dankon! NEA

Ferdinand EISEN (1914-2000), iama ministro pri klerigo de Estona Soveta Respubliko (1960-80), kiu prezidis (1980-91) la landan E-asocion, forpasis la 31-an de oktobro.



El Enckapeno pri la Estona Ennovado

Lerninte Esperanton en la 30-aj jaroj, li subtenis ĝin multmaniere en Estonio, kaj lia renomo forte kontribuis al la grandaj sukcesoj de la jaroj 70/80-aj, kiam ŝtataj eldonejoj aperigis dekkvinon da beletraj libroj estonaj en Esperanto, kaj dudeko da lernejoj fakultative instruis la lingvon. Eisen estis ankaŭ fakdelegito de UEA pri filozofio.

Douglas NORMAN (1919-2000), iama delegito en Purley (Britio), forpasis la 23-an de septembro.

Thorsten SCHLAUCH (1964-2000), iama delegito kaj fakdelegito pri protektado ĉe katastrofoj en Karlsruhe (Germanio), mortis lastatempe.

Hermann SCHRÖDER (1920-1999), prezidinto de Budhana Ligo E-ista kaj redaktoro (1974-79) de ties *Budhana Kuriero*, iama delegito pri budhismo, aŭtoro de la libreto *Budho kaj la moderna homo* (1979), forpasis komence de 1999.

Vesna SKALJER-RACE (1911-2000) mortis antaŭ kelka tempo en Beogrado. Esperantisto kaj UEA-membro ekde 1955/56, ŝi estis kvar jardekojn delegito pri instruado de lingvoj. Ŝi funkciis kiel direktoro de E-Instituto por Serbio ĝis



Arkivo de UEA

1960, gvidis kursojn kaj kontribuis al la revuoj *La Progreso* kaj *La Suda Stelo*. Ŝi verkis same nacilingve kiel en Esperanto. Ricevinte inter 1962 kaj 1987 ne malpli ol 15 diversajn premiojn de Belartaj Konkursoj, ŝi iĝis ties tria plej premiita aŭtoro. Nialingve aperis de ŝi poemoj en *Reeĥoj* (1961), *Maristo surmaste* (poemaro, 1969), *El la vivo* (noveloj kaj skizoj, 1977), kaj tradukoj: *Bosniaj elegioj* (R. Risojević, 1986), *Espanja Espanja* (V. Čerkez, 1986) kaj *Familio Talhe* (I. Horozović, 1991).

Mihály SZEGEDI (1925-2000), iama delegito pri fervoja terminaro, forpasis la 11-an de oktobro. Li aktivis diverspostene en la hungara fervojista E-movado, artikolis en *Hungara Fervojista Mondo* kaj aliloke, kaj prizorgis la E-tekston en la oficiala horaro de la hungaraj ŝtatfervojoj.

Armin DONEIS (1906-2000), dumviva membro, mortis la 30-an de oktobro en Pharr (Teksaso, Usono), kie li estis delegito kaj fakdelegito pri inĝenie-rado.



Arkivo de UEA

Doneis lernis Esperanton en 1927, tuj partoprenis la 20-an UK en Antverpeno (1928) kaj dum posta vojaĝo propagandis la lingvon tra 13 landoj. Reveninte al Usono, li revivigis la E-klubon en Mil-

waukee kaj, kiel la unua rajtigita Cseh-instruisto en Usono, gvidis de 1931 kursojn en kvar ŝtatoj. Doneis servis je diversaj postenoj en Esperanta Asocio de Norda Ameriko kaj laboris ok monatojn en ties centra oficejo. Eksiĝinte el EANA pro ties makartiisma politiko, li kunfondis la landan asocion ELNA en 1952. Li estis inter ties unuaj gvid-komitatanoj, prezidis ĝin (1957-59), membris en la ELNA-estraro trifoje (1955-57, 1961-63 kaj 1969-71) kaj estis elektita ĝia honora membro en 1978.

Ano de UEA ekde 1937, regula mem-

bro de Societo Zamenhof, Doneis servis kiel komitatano A por ELNA (1956-59) kaj usona ĉefdelegito (1969-77).

Kristano aktiva en la metodista eklezio kaj en Kristana E-Ligo Internacia, arda pacifisto, Doneis ne hezitis riski enkarcerigon pro sia rifuzo pagi impostojn, ja uzatajn militcele. Ĝismorte li aktivis pri Esperanto, kaj en lia urbo ofte aperis artikoloj pri la familio Doneis, "internaciema kaj tamen plene usona" (A. Burkhardt), kun la esperantista edzino Mary, tri gefiloj, dek unu nepoj kaj dek kvin pranepoj.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ kependeryby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ mc8750@mlink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobříčovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado, sporto): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17; ☐ esp.togo@cafe.tg.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ kalle@esperanto.se.

Estrarano (kulturo, landa agado): s-ro Tacuo Hugi-moto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyōto, 606-8266, Japanio; ☎/✉ +81-75-711-45-58; ☐ tacuo@oomoto.or.jp.

Observanto de TEJO: d-ro Sjoerd G. Bosga, Trådragargatan 27 D, SE-72337 Västerås, Svedio; ☎ +46/21/417-045; ☐ sjoerd@esperanto.se.

Observanto de ILEI: s-ro Stefan MacGill, Bethlen G. u. 2, HU-2030 Érd, Hungario; ☎ +36/23/364-198; ☐ Stefan.MacGill@galamb.net.

LA ONDO DE ESPERANTO

ĈIUMONATA SOCI-KULTURA REVUO KUN LITERATURA SUPLEMENTO JARFINE

- TRA ESPERANTUJO: Faktoj, problemoj, komentarioj
- CIVILIZO: Kia estis, estas kaj estos la mondo?
- ESPERANTO: lingvo, komunumo, literaturo
- Noveloj kaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj
- MOZAIKO: konkursoj, kvizoj, krucvortenigmaj, humuro
- Ĉiujara proklamo de la Esperantisto de la Jaro

Abonebla kontraŭ 24 eŭroj ĉe UEA kaj landaj perantoj.
Provekezemplero ĉe RU-620077 Jekaterinburg-77, p.k. 67, Ruslando



Festu kun ni la 40-jariĝon de nia Societo. Partoprenu la
Oĝan Internacian Turisman Semajnon 'En Malto

de la 2-a ĝis la 8-a de septembro 2001

Prospektoj kaj aliĝiloj haveblaj ĉe:

Malta Esperanto-Societo,

P.O. Box 142, Valletta CMR 01, MALTA

maltaesp@global.net.mt

www.lora.ch/program/esperanto.htm

Esperanto Sonas Poeme



en la Spontana Teatro de Aventuro

Jan Stanisław Skorupski

legas siajn sonetojn de la nun verkata libro

ATEMPO POTEMA

nur en la interreto tone eldonata

La oka eldono (2000) de la *Suplemento de la Etimologia vortareto pragmata de esperanto* de YAMASAKI Seikō aperis. Ni sendos ekzempleron al tiuj kiuj, enfermante 2 irk, petos pri ĝi.

Ĝi estas 67-paĝa kaj entenas korektojn kaj ampleksigojn, en kiuj ĝia metodo (aŭtonomio de la esperanta etimologio) estas pli eksplacita.

Libroteko Tokio

7-15, Nisi-Nippori 3, Arakawa-ku

Tokyo, 116-0013 Japanio

La vortaron mem (250p, 26cm, €21,00)

mendu ĉe la Libroservo de UEA.

GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ

Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis tiun ĉi lernolibron de Unesko pri homaj rajtoj, aperintan antaŭe jam en 16 aliaj lingvoj. Leah Levin estas brita fakulo pri homaj rajtoj. La unua parto de ŝia libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj al la hom-rajta edukado. La dua parto klarigas la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu, fama franca karikaturisto.



HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ. Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Prezo: € 10,90.

TREJNADO LA INTERNACIAN SENTENON

Ekperiment-seminario

Partoprenantoj serĉataj por sociopsikologia memspertgrupo, inter 10-15 personoj el diversaj landoj. Laborlingvo Esperanto. La tri-taga renkontiĝo kun tranoktado kaj nutraĵo, apud Balatono (HU), estas senkosta. Okazadtempo: 23-25 marto 2001.

Interesatoj bonvolu kontakti por pluaj informoj:

☎ +49-89-280788; ✉ eumacko@faxvia.net

Renkontiĝo de geamikoj pri
INTERNACIA SOLIDARECO

"SARAJEVO 2001"

29.07. - 2.08.2001.

informoj ĉe: *Esperanto-Ligo de BkH*
p.p. 452 BA-71000 Sarajevo
Bosnio kaj Hercegovino
✉ kjak@bih.net.ba



En 2000 207 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof


Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en 1999 estis teketo por kredit-kartoj. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



PRAGA MANIFESTO PROFUNDE

KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS. Red. O. Buller kaj R. Corsetti. Rotterdam: UEA, 1999. ISBN 92 9017 061 1. 24p. 30cm. Prezo: € 5,40.

Studkajero pri la temoj de la Manifesto de Prago: demokratio, transnacia edukado, pedagogia efikeco de Esperanto, plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj homa emancipiĝo.



Zagrebo kun propra stelo!

Plaĉe akompanos viajn leterojn en la monatoj antaŭ la UK la bunta kongresa glumarko (5x4 cm). Mendebila ĉe la Libroservo de UEA: 10-peca folio kostas € 1,20. Triona rabato ekde 3 folioj.



RESPONDOJ PRI RASISMO


"Infano estas scivolema. Ĝi faras multajn demandojn kaj ĝi atendas precizajn kaj konvinkajn respondojn. Per ĉi tiu libro mi provas respondi la demandojn de mia filino. Ĝi celas la infanojn kiuj ankoraŭ ne havas antaŭjuĝojn kaj volas kompreni. Pri la plenkreskuloj, kiuj ĝin legos, mi esperas ke ĝi helpos ilin respondi la demandojn, pli embarasajn ol ni kredas, de siaj propraj infanoj." (Tahar Ben Jelloun)

Tiu ĉi libro de la Marok-devena aŭtoro enorme furoris en Francio. En 1987 Tahar Ben Jelloun gajnis la prestiĝan Premion Goncourt.



PAĈJO, KIO ESTAS RASISMO? Tahar Ben Jelloun (1944). El la franca trad. Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil. Rotterdam: UEA, 1999. 52p. ISBN 92 9017 063 8. 19cm. Prezo: € 6,50.

SUFERVOJO DE KNABINO



DE TAJGO AL MINARETOJ. Aktoraro laŭ la taglibreto de Ada Sikorska-Fighiera. Jadwiga Gibczyńska. Rotterdam: UEA, 2000. 18p. ISBN 92 9017 070 0. 21cm. Prezo: € 3,00.

Monodramo laŭ la taglibreto de la juna Ada Sikorska atestas pri kruelaĵoj de la dua mondmilito. Kiel 10-jarolino ŝi estis deportita al Siberio, de kie ŝi fine sukcesis reveni al Pollando tra Irano, Libano kaj Britio.


VORTARO DE HEJMA ESPERANTO

Parolantoj de Esperanto, kiuj uzas la lingvon hejme, ofte ne trovas en ordinara vortaroj nomon por iu enhejma aĵo aŭ ago. Hejma vortaro helpas al ili. Ĝi proponas Esperantajn nomojn por diversaj ĉiutagaj aferoj. La Esperantaj kapvortoj estas re-koneblaj per difino, kiun sekvas traduko en dek tri lingvoj:

angla, finna, franca, germana, hebrea, hispana, hungara, itala, japana, nederlanda, portugala, rusa kaj sveda. La materialon kolektis la anoj de la komputil-reta diskutejo DENASK-L kaj Rondo Familia.



HEJMA VORTARO. Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto. Red. Jouko Lindstedt. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2000 (represo de la unua eldono). 63p. ISBN 92 9017 065 4. 21cm. Prezo: € 7,50.



FESTU TINĈJON EĈ 72-JARAN!

De kiam la detektiveto debutis en 1929, vendiĝis milionoj da Tinĉjo-bildstrioj en pli ol 32 lingvoj. La du Esperantaj titolojn oni jam kredis elĉerpitaj, sed nia Libro-servo akiris stokon de La nigra insulo; ĝi estas nun ties ĉefa distribuanto.

La nigra insulo. Hergé. Trad. Jopetro Danvy. Paris: Esperantix, 1987. 62p. 30cm. € 10,00.

PRAGA MANIFESTO POR INFORMADO

PRAGA MANIFESTO DE LA MOVADO POR LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO. Rotterdam: UEA, 2000. 19p. ISBN 92 9017 069 7. 21cm. Prezo: € 2,10.

La Praga Manifesto, subskribita de 14 000 esperantistoj, pruviĝis bonega informilo pri Esperanto. Tiu ĉi belaspekta kajero havas ĝian tekston, kun klariga enkonduko, en Esperanto kaj en la oficialaj lingvoj de UN (angla, araba, ĉina, franca, hispana, rusa).

